



GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

NUNTEMPAĴOJ : La amuzajoj de Abd-ul-Aziz (MAROKO), de *E. Bacquet* (FRANCUJO).

POLITIKA VIVADO : La Islanda Parlamento, de *Th. Jh.* (ISLANDO).

DIVERSAĴOJ : Kelkaj oktobraj britaj kutimoj, de *Fino C. W. Oxenford* (ANGLUJO). — Sveda Kristnasko, de *Fino H. C.-d.* (SVEDUJO). Espero je Mesio, de *Karl Zacherl* (BAVARUJO). — Kristano ĉe la Bohemoj, de *F. Svačina* (BOHEMUJO).

PRI ESPERANTO : Lastaj ejoj de l' kongreso : La Balo ; Esperantistoj promenantaj ; la laboraj kunsidoj, de *Steleto*. — Kelkaj praktikaj aferoj de *Th. Rousseau* (FRANCUJO).

ĈIULANDA VIVADO : Vilaĝana movado en Gurujo, de *D^{ro} M. K.* (RUSUJO).

VIRINA PAĜO : La modo, de *Roksano*.

TURISMO : La cedrarbaro de Téniet-el-Hâd, de *M. Mende* (ALĜERUJO).

FELIETONO : Poŝta Amo, de *Johano Munoz kaj Pabon, kaj Johano Garcia Martin* (HISPANUJO).

MIKSAĴOJ : Por la propagando, ludoj, konkursoj, k. t. p. de *Ch. Brunet*. — La feliĉo, de *Kabe* (POLUJO).

Junulara Aldono.

La du haroj de l'Okazo, de *J. Berr de Turique kaj Johanino Flourens*. — Ĉe la soldatejo, de *Teyssonneau kaj L. Rigoir*. — Kristnaska infana rakonto, de *Fino O. Prudent*. — Fizikaj amuzajoj, de *Amatus* (BELGUJO).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro : 10 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio : British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.
Svedujo : S^o P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, 46, Rue S^o Anne, Paris.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

FOTO-REVUO INTERNACIA

ABONOJ: Jare 5 Frankoj. — 1 Numero aparte 0.50.
estas la ĉiunmonata resumo de

PHOTO-REVUE

Journal des amateurs de Photographie.

— QUI PARAÎT TOUS LES DIMANCHES —

ABONNEMENTS :

FRANCE 6 FR., ÉTRANGER 8 FR.

POŝHORLOĜO « ESPERANTO »

FABRIKEJO AURÉOLE

En La Chaux-de-Fonds, (Svisujo).



Tra Oberland Berna

ILUSTRITA GVIDLIBRETO

de TH. HOPF, Apotekisto, Adelboden

aĉetebla ĉe OSCAR HOPF, Thun

svisa esperanta eldonejo.

(Prezo 50 centimoj).

ANGLA-ESPERANTA LERNEJO POR KNABINOJ.

Tutjarloĝantinoj. Fraŭlino EVERDELL L.L.A.

College House, Bridgwater, Somerset, Anglujo

— Korespondas Esperante. —

Ĉampanvino "Mirinda"

Sciigojn ĉe S^{ro} Ch. JADEAU

en MERCUREY (S. & L.) FRANCE.

LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ

La falo de l' Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE & C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

"Esperantine"

BONEGA DIGESTIVA LIKVORO

Ĝenerala vendejo por Francujo kaj alilandoj :
BRUNON-GHAUVET, Saint-Etienne (France).

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn),
enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron
obligantan tuj kaj senprezare deĉifri kaj legi
ĉion esperante skribitan » Enmetebaj en leteron
sen pliiĝo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, germana, franca,
ilala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj
poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Sinjorinoj!

Se vi volas ne plu suferi je la monataj
sangelfluoj aŭ je la epoko de ilia mal-
apero, ensorbu la

DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendanĝeran produktaĵon, bombonforman,
kiu tuj kaj certe forigos la doloron.
Por havigi la Dragées Blottière, sendu
2.25fr. poŝt-aŭ kartmandate, 102, Rue
Richelieu, PARIS.

Hôtel de la Paix kaj Terminus

Bourg (Ain) France, apud la stacidomo.

Salono je l' dispone de l' trapasantaj esperantistoj.
« Tra la Mondo » legebla.

Mastro : S^{ro} CORSAINT, kas. de l'Esp. Grupo.

SE

vi konas malfacile spiranton (astmemulon),
vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exibard »
(Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudre, cigarede,
aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo.
Tiu kuracilo, ordonata de ĉiuj kuracistoj,
sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare.

Sin turni al

Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark N^o 270,042.
Marque déposée N^o 13,195
Registered Label N^o 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la
nomon ESPERANTO sur la aŭŝeto, kiu estas
desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso : Esperanto - Glasgow.

FERVOJOJ de PARIS ĝis LYON kaj LA MÉDITERRANÉE

La kompanio ĵus eldonis Albumon artplenan titolitan « Itinéraire illustré de Paris au Mont-Blanc » (ilustrita vojararo de Paris ĝis la Blanka-Monto).

Tiu albumo enhavas, kun noticoj pri la plej interesaj lokoj de l' vojararo, tre bele tajn ilustraĵojn kvazaŭ-gravure kaj plumdesegne; plue tiu albumo estas ornamita per kartografiaj panoramoj elmontrantaj por la leganto ne sole la urbojn kaj lokojn trairatajn de la fervojo, sed ankaŭ la landojn kuŝantajn en vasta ĉirkaŭaĵo.

La albumo estas vendata, po 50 centimoj la ekzemplero, en la bibliotekoj de l' ĉefaj fervojaraj stacidomoj; ĝi estas ankaŭ sendebla, hejmen, laŭ peto akompanata de 60 cent. poŝtmarke kaj sendita al la « Service Central de l'Exploitation, 20, boulevard Diderot, Paris (France).

Ankaŭ eldoniĝis, en la samaj priskribaj kaj ilustraj kondiĉoj « Itinéraire illustré : Paris — Lyon — Marseille — la Côte d'Azur. »

Aĉetebla, po 50 cent. la ekzemplero, en la staci-bibliotekoj aŭ mendebla, kun 60 cent kiel la antaŭa, ĉe la « Service Central de l'Exploitation, 20 boulevard Diderot, Paris (France).

Rilatoj inter Paris kaj la Côte d'Azur.

Por la vintra sezono 1906-1907, la K^{io} P. L. M. ekmarŝigis:

la rapidajn tagajn vagonarojn (Côte d'Azur-Rapido) Paris-Nice en 13 h. 50m.

la rapidajn noktajn vagonarojn (Vagonaroj 17 kaj 18) Paris-Nice en 15 h.

Nombro de lokoj limigita.

Por plua sciigo, vidu la « Livret Guide Horaire P. L. M. »

NUNTEMPAĴOJ

La Amuzajoj de Abd-ul-Aziz.

Oni rimarkas maltrankviligan agitadon ĉe la gentoj algeriaj kaj marokaj loĝantaj je la limo de la granda algeria kolonio franca kaj de l' Maroka imperio.

Ŝajnas ke ne estas fremda je tiu agitado la sultano iom mistera, kiu intermiksas perfidan politikon kaj infanajn ludojn.


Tiujn lastajn tuj ekvidigos nia kunlaboranto E. Baequet.

Kiel ĉiuj regnestroj, la sultano maroka estas en sia palaco malliberigita de la tradicio. Tiu palaco, el kiu li preskaŭ neniam eliras, kuŝas en urbo malsama je l' urbo de ĉiuj, Fez-el-Djedid, najbara sed apartigita de Fez-el-Bali, kaj malproksime de la n. sanktularo; li aperas nur en la tri ĉiujaraj festoj: la Safo, fondita por la memorigo de l' ofero Abrama; la Rompo de la fasto kaj la datreveno de la naskiĝo de la Profeto.

Kiam li aperas en tiuj solenaj cirkonstancoj, rajdanta sur blanka ĉevalo, jungita kaj selita... de palverda deluro ore ornamita, majeste drapirinta sin en tiu delikata blanka burnuso, kiu lin vindas tute, gardata de altranga oficisto, kiu altigas super lia kapo la ombrelon el ĉerizkolora atlaso (emblemon de ĉiopovo), kiun kronas ornamita bulo, antaŭirata de dekduo da nigraj sklavoĵoj, kiuj ŝvingas muŝŝirmilojn, sentegon de religia respekto li inspiras al la popolo, kiu lin apenaŭ ekvidas kaj salutas per piaj formuloj. Li ja estas la Regnestro absoluta, la « princo de la Kredantoj. »

Pri kio do povas okupiĝi reĝo tiel malmulte proksima kaj najbara de sia popolo? — La reĝo amuziĝas, oni povus diri; sed, ĉar la orientaj amuzajoj estas iom limigitaj, lia Moŝto ŝerifa volonte konatiĝis kun la eŭropaj amuzajoj kaj sportoj, dank' al grupeto, iel « ŝatularo », kiun regas kaido Mak-Lean, Skoto antaŭ pli ol dudek jaroj akceptita de Mouley-Assan kiel militinstruisto. Li ja estas la iniciatinto de la sultano pri la nobla bilardludo kaj favoris la enigon en Fez'on de ĉiuj modernaj elpensajoj aŭ fantaziaĵoj kapablaj distri la regnestron.

En angulo de Fez-el-Djedid estas kvartalo rezervita por la Eŭropanoj, kiun ĉiuposttagmeze la Sultano vizitadas. Tie kuŝas bestejo ne provizita (ho! ve!) de la dezerto, sed de Hamburg'o, kie estas la ĉefvendejo de bestoj; la bilardsalono, la kavo por fizikaj aparatoj. Tie li ekzercadiĝas je la biciklo, pri kies uzado li volis instrui siajn edzinojn; tie estas liaj aŭtoveturiloj, fervoĵeto laŭ *Decauville*, vaporŝipetoj,



LA KAVO POR FIZIKAJ APARATOJ.

aerostatoj, glacimaŝinoj, ĉiuj ĝis nun konataj fotografiloj, kinematografoj, telegrafoj senfadenaj... Kaj ankaŭ la plej perfektigitaj ludiloj meĥanikaj, aerŝipo direktigebla aŭ ĉevalo artikita, donacoj de plenrajtigitaj ministroj. Pli malproksime malfermiĝas laborejoj por la eŭropa komizaro de la sultano. Tie oni riparas la aŭtoveturilojn, oni elaperigas la fotokliŝaĵojn; tie ankaŭ oni inspiras la mendojn, kiuj estas multaj, senperaj kaj ofte ridindaj ordonoj.

Bedaŭrinde la popolo maroka iom skandaliziĝis pro l'entuziasmezo de sia sultano al niaj plej modernaj progresoj, kaj precipe pro lia pasio al la fotografarto, ĉar Korano ne malpli firme ĝin malpermesas ol la statuarton, la pentrarton aŭ kian ajn arton, kiu celas la kopion de l'homa figuro. Oni povis vidi, per portreto en nia revuo presita de Abd-ul-Aziz, ke nek li, nek lia ĉirkaŭantaro montras malgajan mienon al la fotografilo.

La juna ŝerifo ne nur permesas, ke oni lin fotografu, sed li mem ofte fotografas kaj la rezultatoj kiujn li atingas honorigus metiiston. Li ne kontentiĝas elaperigi kaj eltiri siajn foto-provaĵojn, ilin li gluas, elpreparas, enkadrigas kaj sukcesas doni artan propran karakteron al ĉiuj siaj ellaborajoj.

La sultano ne malpli multe interesiĝas je la ceteraj akiraĵoj de la scienco. Al li ne sufiĉas vidi per siaj okuloj la funkciadon de telefono aŭ elektra lampo, aŭ de kia ajn aparato, per kiu la plej mistera naturforto, obeema al la homa volo, ĉiutage plenumas miraklojn, li postulas klarigojn; li volas ellumigi, eĉ en la plej malgrandaj detaloj, la prisciencajn problemojn, kiuj al li prezentigas.

Verŝajne, ja, tiu pasio al la eŭropajoj, kaj sekve lia nekonscia inklino al la reformado de l'imperia administrado, apartigante lin de lia popolo, parte kaŭzis la nuntempan krizon.

Tartareno de Taraskono en Alĝerio volis iĝi mahometano; la ŝerifo kontraŭe iĝis rumi'o (kristano), diras la Marokanoj, li vendis Marokon al la Angloj.

E. BACQUET.

Ni ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de « Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la adresŝanĝojn NUR laŭ peto AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas repressi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata ĈIAM CITI LA DEVENON DE l' ARTIKOLO, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.

Ni respondas nur al la leteroj akompanataj de la respondeca poŝtmarko.

La Islanda parlamento.



HANNES HAFSTEIN.
La nuna Islanda ministro.

En la pasinta Julio estis en Danujo festata vizito de la islanda parlamento kaj tiam la dana reĝo vidis, la unuan fojon, kunvenintajn ĉe li ambaŭ parlamentojn de sia regno: la danan parlamenton kaj la islandan.

Eble la ekzisto de la islanda parlamento estas nesciata de la plimulto el la legantoj de « Tra la Mondo ». Tamen ĝi eble estas ne malpli rimarkinda ol multaj aliaj. Almenaŭ ĝi estas el la plej maljunaj parlamentoj en la mondo. Post 24 jaroj povos okazi ĝia miljarfesto. Preskaŭ la tuta politika historio de Islando estas ankaŭ historio de la islanda parlamento.

Islando estis trovata de Skandinavo en la naŭa jarcento, kaj en la jaroj 874-930 enmigris tien multaj

Norvegoj, ĉar ili ne volis toleri la regadon de *Haraldo harbela*, kiu fariĝis sola reĝo en Norvegujo post la venko de la lokaj regantoj. En Islando la norvegaj enmigrantoj estis sendependaj, kaj ĉiu ĉefulo regis en sia diskrikto laŭ la leĝoj de sia antaŭa hejmo. Sed baldaŭ oni sentis la bezonon havi komunajn leĝojn por la tuta lando kaj tial oni fondis en la jaro 930 la parlamenton, kiu havis la plej superan leĝdonan kaj juĝan potencon kaj estis en islanda lingvo nomata *alþing* (forum'o de ĉiuj). La lokaj ĉefuloj havis la plej grandan influon en la parlamento, sed, krom ili, venis al la ĉiujaraj duonmonataj kunvenoj en la monata junio ankaŭ tre multaj aliaj homoj el ĉiuj partoj de l' lando, kaj en multaj rilatoj tiuj kunvenoj havis tre grandan influon sur la vivon de l' popolo. Tie la junuloj provis vete sian korpan lertecon; kaj eĉ por la literaturo la kunveno de la parlamento havis grandan signifon, ĉar tien venis homoj, kiuj estis vojaĝintaj en fremdajn landojn kaj rakontis tie antaŭ ĉiuj siajn aventurojn kaj aliajn novaĵojn. La loko de parlamento do estis la vera ĉefloko de Islando. Kiam oni fondis la parlamenton oni tre zorge serĉis lokon por ĝi, kaj fine oni elektis kampon, kiu poste estis nomata *Kampo de parlamento* (*Thingvellir*) en la suda parto de l' lando, tre belan kaj grandiozan lokon. La tero estas tre vulkana; la kampo estas ĉirkaŭita okcidente kaj oriente per grandegaj fendoj, inter kiuj la tero malleviĝis; en suda direkto estas granda kaj bela lago kaj en ĉiuj direktoj pli malproksime estas grandaj kaj belaj montoj. Por plibeligi la lokon, la antikvaj Islandanoj plue direktis riveron, kiu fluis ne malproksime, en la okcidentan fendon: tra ĝi en kelka spaco kaj ree el ĝi tra la kampo kaj tiel faris, en la rivero, du belajn akvofalojn.

En Islando estis respubliko (930-1264); la parlamento estis la plej supera leĝdona kaj juĝa potenco de la lando; sed ĝia administracia potenco estas tre malgranda. La parlamento havis prezidanton, kiu estis elektita por 3 jaroj, sed lia ĉefa tasko estis nur eldiri aŭ komuniki la leĝojn de l' lando en la komenco de la kunvenoj, sed neniu centra registaro ekzistis. La juĝoj de l' parlamento devis tial esti ekzekutataj de la venkanta parto. Ĉar la centra regado ne estis sufiĉe forta, la disputantaj ĉefuloj kelkfoje provis sian apogi je la potenco de la norvega reĝo kaj fine (1264) la Islandanoj ĵuris fidelecon al la norvega reĝo. Tiel li fariĝis ĉefo de la administracio kaj partoprenanto en la leĝdonado, sed la parlamento konservis cetere sian potencon. Iom post iom tamen pliĝrandiĝis la potenco de la reĝo, la konsisto de la parlamento ŝanĝiĝis, kaj ĝia influo plimalgrandiĝis; tamen ĝi uzis sian leĝdonan potencon ĝis la 18^a jarcento, kaj tiu ĉi potenco estis neniam formale forigata, sed en la realeco restis nur parte la juĝa potenco de la parlamento, kaj en la jaro 1800 ĝi estis tute forigata kaj anstataŭata per supera juĝejo en Reykjavik, kiu nepre havis neniam leĝdonan povon.

En la jaro 1380 Islando venis kun Norvegujo sub regadon de la danaj reĝoj, sed kiam Norvegujo fariĝis memstara en 1814, Islando restis sub Danujo. La lastan jarcenton la Islandanoj batalis por reakiri sian antaŭan liberecon kaj memstarecon. En la jaro 1843 la antikva parlamento (*alþing*) estis refondata en *Reykjavik*, la ĉefurbo de Islando, sed nur kun konsila, sed ne leĝdona povo. La trian kvaronon de la jarcento Islandanoj batalis por plia libereco sub la lerta konduko de *Jon Sigurdsson* (+ 1879), la plej granda politikisto de Islando, kiu longtempe estis prezidanto de la parlamento, kaj kies memoron ĉiuj Islandanoj tre estimas.



LA INSIGNO DE ISLANDO.
Blanka falko sur blua fundo.



THINGVELLIR.

La rezultato de tiu ĉi batalado estis la konstitucio de 1874, kiun la reĝo donis kiel absoluta reganto al Islando dum ĝia miljara festo. La konstitucio donis al la parlamento leĝdonan potencon kune kun la reĝo, kiu devis trovi ministrojn por la islandaj aferoj. Sed tiu ĉi ministro estis ĉiam Dano, kiu loĝis en Kopenhago kaj neniam venis en la islandan parlamenton aŭ havis ian konon pri la islandaj aferoj. Tial la Islandanoj komencis novan konstitucian bataladon, el kiu rezultis la ŝanĝo de la konstitucio en la jaro 1903, laŭ kio la islanda ministro devas esti Islandano, loĝi en Rejkjavik kaj partopreni en la kunvenoj de la parlamento. La islanda ministro nun estas (de 1904) *Hannes Hafstein*, kiu ankaŭ estas konata kiel bona lirikisto. La vizito de la islanda parlamento, la lastan someron, al la dana parlamento kaj al ilia komuna reĝo vidigas, ke, de nun, Islando devas esti rigardata, sentime kaj kun bona espero.



Jon Sigurdsson

JON SIGURDSSON († 1879).

La plej granda politikisto de Islando.

ne kiel dependaĵo de Danujo, sed kiel memstara reĝolando unuigita kun Danujo. En plej proksima estonteco la interliga leĝo estos verŝajne revizata kaj akceptata de la parlamentoj de ambaŭ landoj.

La islanda parlamento nur kunvenas ĉiun duan jaron kaj kunsidas ĉiufoje dum du monatoj. Ĝi dividiĝas en du sekcioj, la suba kun 26 membroj elektitaj de la popolo, kaj la supera kun 14 membroj: 8 elektitaj de la popolo kaj 6 de la reĝo; sed kiam la sekcio ne povas interkonsenti, ambaŭ sekcioj kunvenas kaj la tuta parlamento tiam formas nur unu sektion. Malgraŭ la konstituciaj malfacilaĵoj la parlamento faris grandan laboron, kaj oni eĉ diras, ke Islando faris pli multajn progresojn dum la lasta kvaronjaro post la dono de la konstitucio en 1824 ol dum la antaŭa jarmilo. Almenaŭ la Islandanoj rigardas antaŭen al la estonteco

ТН. ТН.



Espero je Mesio.

de WALTHER EGGERT-WINDEGG.

Sur la stepo galilea briladis la nokta ĉielo. Tiel silenta estis ĉio, ke laŭta krio trakuris preskaŭ la tutan universon. Tiu ĉi laŭta krio eliris el la brusto de maljuna paŝtisto. Ĉu ĝi estis malfrua plendado pri lia plej kara mortinto?

« Ho mia Benjamenino! Benjamenino! » alvokis la maljunulo. Sed laŭdado ĝi estis, ne plendado:

« Feliĉega mi nomas vin, la malvivulon, la saviton el nokto kaj el dubo! »

Tiam la buŝo fermiĝis ree por longa silentado, kaj mediteme la malhelaj okuloj rigardis teren. Maldolĉeco plenumis la koron de l' maljuna viro:

Tra du generacioj li portis en la brusto la esperon je la Mesio, jam tra du generacioj bruladis al li en koro sopirema la promeso pri tiu, kiu estis venonta, — sed unujn post aliaj li entombigis; tutan generacion li postvivis; ankaŭ mortis lia Benjamenino, kaj nun li sola postrestadas por ĉagreniĝi profunde en vana espero. — Kiel printempa ventego kaj kiel vintra ventego lin estis atakinta la sopiro al la Savonto de l' mondo. Sed nenia Mesio estis malsuprenirinta de la ĉielo; kaj li mortos, kiel li timis ne vidinte lin.

Kaj li diris: Ne ekzistas Dio! —

La grandaĝulo kaŝis la kapon per la manoj. Li tre volonte plorus pro pento tial ke li elparolis:

Ne ekzistas Dio; — ho, kiel do tiu larmo liberiga estus al li bonfara! Sed ne ekzistas Dio! Kaj malesperante, li kaŝis sian vizaĝon per la manoj.

Tiel li sidis longtempe kaj maldormis ĝis nokto-mezo, pripenseme. Subite varma spiro tuŝis lian vizaĝon. Lia karesema hundo estis alproksimiĝinta al li, kvazaŭ la fidela besto sciis, kiel kriegis la koro de l' maljuna paŝtisto, sopirante je amo. Kaj varmegan larmon fluigis la malseka okulo.

« Jahve! » ekkriis la maljunulo, « Jahve, Vi vivadas! Nur la malsaĝulo parolas en sia koro: « Ne ekzistas Dio ». Dia Moŝto, rigardu malsupren de viaj altegaj lokoj! Eternegulo! Plejgrandulo! Patro! Ekkompatu pri ni; Reganto de l'universo, igu vidi viajn okulojn al ni, sendu radion de via kompatito en nian koron! »

Kaj tiam li leviĝis kaj eljetis en la nokton kriojn de brulanta sopiro:

« Jahve! En vi mi estigas mian esperon. Ne malpravigu ĝin! Vi promesis Lin, kaj tial mia sopiranta animo postulas Lin de Vi, Lin, la Savonton de l' mondo. Dio! Tiel mi staras, levinte al Vi la okulojn, la manojn, por ricevi; tiel mi vokas:

Malfermiĝu tero! La Savonton elvenigu! Festu Lin, ĉieloj! Kaj vi ankaŭ nuboj, per pluvo! »

Tiel staradis la paŝtisto, rekta, kun brakoj eten-

ditaj, kun okuloj brulantaj kaj kun varmega animo. Subite dolĉa ekstremo prenis lin, kaj li vidis ion ekbrili ĉe la nokta ĉielo, super Betlehemo: mirindbela brilado ekiĝis tie, aro da lumo, kiu malsuprenfluis sur lin kaj lin ĉirkaŭis, kaj nevole li falis surgenue kaj fermis la okulojn. Antaŭ lia animo prezentigis amindĉarma figuraĵo ĉirkaŭita per belega brilado: li vidis dian infanon en manĝujo kaj rigardis puran virinon antaŭ li kuŝantan kaj lin adorantan. Kaj la

ĉieloj kaj la tutmondo pleniĝis per dolĉega kantado:

« Honoro estu al Dio en la ĉielo kaj paco al la homoj sur la tero, kiuj havas bonan voladon! »

Tremante li leviĝis. Kaj kun la brakoj etenditaj, kun fermitaj okuloj, pleniĝita per la brilado de sia stelo, gvidata de sia sopiro, li migris Betlehemon...

Trad. de KARL ZACHERL.
(Bavarujo).



Kelkaj oktobro-monataj britaj kutimoj.

De Fraŭlino C. W. OXENFORD (Britujo).

Estis kaj estas ankoraŭ multaj kuriozaj kutimoj en Granda Britujo dum tiu ĉi monato; kelkajn el kiuj mi penas priskribi.

13^{an} tagon: — nomatan malnova Michaelmas Tago, ĉar antaŭe, la festo de St. Michael estis solenigata en tiu tago; nun tio okazas la 29^{an} de Septembro.

Ĉe Bishop's Stortford, en Hertfordshire, malnova Michaelmas estis nomata « Ganging Tago », sed mi ne scias ĉu la vorto 'gang' estis uzata laŭ la senco de la angla vorto kiu signifas 'bando', aŭ laŭ tiu de la skota vorto kiu signifas 'iri'.

Tamen, en tiu tago, la junuloj renkontis sin sur kampo, elektis kondukanton, kiun ili sekvis kien ajn li iris; kaj ju pli malfacila aŭ malplaĉa la vojo estis, des pli amuzataj estis la sekvantoj. Dum ilia irado ĉiu kiun ili renkontis estis 'bumped', tio estas ke la renkontito kaj alia estis kaptitaj ĉe la brakoj, kaj forte frapataj (bumped) unu kontraŭ la alia. Estas malsekse diri, ke virinoj restadis hejme dum « Ganging Day ».

Ĉe Rochford, en Essex, kutimo ekzistas, kiu okazis ĉiujare dum la feŭdaj tempoj. Ĝi estas nomata « La Senleĝa Kortego » (Lawless Court), kaj ĝi okazas en la unua merkredo post la malnova Michaelmas je la noktmezo sur monteto, nomata « La Monteto de la Reĝo »; la afero estas kondukata laŭ la plej mistera maniero. Ĝi estas tiel nomata ĉar ĝi okazas je nelaŭleĝa horo, kaj ĝia deveno estas jena:

Antaŭ multegaj jaroj, Moŝto eltrovis konspiron, kiu estis farita kontraŭ li kaj liaj vasaloj. Por puni la konspirantojn, li ordonis, ke ili faru al li riverencon, en speciala nokto, inter noktmezo kaj la sunleviĝo, sur la monteto, senlume, kaj ili devis nur elparoli mallaulajn vortojn. La intendanto vokas nome ĉiujn personojn, kiuj devas esti tie, kaj tiuj kiuj forestadas estas monpunataj.

25^{an} tagon. La Festo de St. Crispin

Ĉe Hexham, en Northumberland, la botistoj kunvenas ĉe restoracion, kie ili tagmanĝas. Ili elektas gereĝojn kaj membrojn de la reĝa familio, kaj post tagmanĝo, Reĝo Crispin kune kun sia kortegano promenadas tra la stratoj, kun muziko kaj portante flagojn; ili finas la tagon per dancoj vespere.

Ĉe Tenby, en Wales, en la vespero antaŭ la festotago, figuraĵo de la sanktulo estas pendigata ĉe la preĝeja turo; en la mateno de la festo, tiu estas tranĉata, kaj portata tra la stratoj inter procesio de popolamaso, kiu lasas ĉe ĉiu domo paperon, kiu estas kvazaŭ la lasta testamento de St. Crispin, kun peco de la vesto per kiu la figuraĵo estas vestita. Kiam oni estas disŝirinta la lastan pecon de la vesto, la homamaso uzas la pupon kiel 'football', tio estas pilko kiun oni forte piedfrapas. Ne tre sankta uzado de la malfeliĉa Crispin!

31^{an} tagon. La Brita nomo de tiu ĉi tago estas «Hallowe'en», kaj signifas la vesperon antaŭ la Festo de Ĉiuj Gesankuloj.

En tiu ĉi tago, spite la Civilizacio, eĉ nun estas multaj superstiĉaj kutimoj, kiuj okazas en la kamparaj vilaĝoj, precipe inter la gejunuloj, por kiuj estas tempo antaŭvidi la estontan sorton. Kelkafoje oni nomas tiun ĉi vesperon « Fendnuksa Nokto » (Nutterack Night), pro la kutimo fendi kaj manĝi nuksojn dum oni sidas ĉirkaŭ la fajro. Tiuj, kiuj deziras scii ion pri sia estonta edzo aŭ edzino nomas nukson laŭ la nomo de sia amiko aŭ amikino kaj ĵetas ĝin en la fajron; do, ĉu ĝi brulos kviete, aŭ bruege, aŭ elsaltos el la fajro tio estos pruvo de la feliĉa aŭ malfeliĉa amo de la persono, kiu ĝin ĵetis.

« La Eltiro de brasiktrunketoj » (Pulling kail-sticks) estas alia metodo, per kiu la skotaj junulinoj penas antaŭdiri la estonton. Kelkaj iras en la ĝardenon, kun la manoj en la manoj kaj okulkovritaj, (kompreneble kun iu, kiu kondukas ilin) kaj eltiras la unuan brasikon, kiun ili tuŝas, kaj, laŭ la longeco, la malfleksebleco de la trunketo, aŭ laŭ la malacideco aŭ akreco de la interno oni divenas kian specon de edzo oni havos; se iom da tero tenas al la radikoj, tio montras 'dot' on. Poste, la trunketo estas alligataj super la pordegon, kaj la baptonomoj de tiuj neatenditaj, kiuj alproksimiĝas al la pordo, estos la nomoj de la estontaj edzoj.

Kelkafoje tre kuraĝa junulino iras noktmeze en ĉambro senluman kaj staras antaŭ spuglo, dum ŝi kombas al si la harojn, esperante (aŭ pli ofte, timante, mi pensas) vidi la vizaĝon de sia estonta amato.

Alia, zorgante ke neniu rigardas ŝin, eliras el la domo kaj dissemas manplendon da semoj de kanabo, samtempe dirante al si « Hemp seed I sow thee, Hemp seed I sow thee, and he who is to be my true, come after me and pull thee. » (Kies libera traduko estas: — Kanaba semo mi dissemas cin, kanaba semo mi dissemas cin, kaj kiu estos mia vera amato, tiu sekvu min kaj eltiru cin.) Dum ŝi dissemas kaj tion diras, ŝi ofte ekrigardas dekstren, maldekstren, kaj eble ŝi vidas fantomon, kvazaŭ li eltirus la kanabon.

Ankoraŭ alia metodo estas kuŝiĝi en ĉambro, kie estas fajro; kaj metinte malsekan veston (mi ne skribos kian) antaŭ la fajron, ne dormu sed observu, kaj eble fantomo venos kaj turnos la veston, kvazaŭ por sekigi ĝin aliflanke. Se neniam fantomo aperas, kompreneble oni ne edziĝos.

Ĉe Ripon, en Yorkshire, la lasta tago de Oktobro estas nomata « Kuka Nokto » (Cake Night), ĉar en ĉiuj domoj, la mastrino faras kukon por ĉiu persono.

En antaŭtagoj, estas ludo, kiu multe amuzas la ludantojn sed plie la rigardantojn. Ĉe la plafono estas pendigata horizontale bastono, portanta ĉe unu fino kandelon, ĉe la alia pomon. Do, oni rapide turnigas la bastonon dum geknabo, kun manoj ligitaj poste, eksaltas kaj penas kapti la pomon buŝe. Pli ofte oni kaptas la kandelon, sed neniu kompatas, nur ĉiuj ridegas.

Estas malnova angla kutimo manĝi kukojn en kiuj estas semoj, nomataj angle 'caraway', france 'cumin', je la fino de la sezono de grendisemo; kaj egale manĝi 'Froise' on, (dika kuko kuirita en pato), je la fino de la sezono por dissemi hordeon kaj fabojn.

En Morayshire, en Skotlando, oni solenigas la sukcesajn rikoltojn de la grenaro per grandaj fajroj sur alta tero.

En kelkaj partoj de la kamparo, estas superstiĉo, ke tiuj infanoj kiuj maskiĝas en « Hallowe'en » povas vidi kaj komuniĝi kun supernaturaj estaĵoj.

En Norda Wales, ĉiu familio ekbruligas grandan fajron en la vespero, kiun ili nomas « Coel Coeth » (mi ne scias kiel traduki tiujn ĉi vortojn). La fajro estas ekbruligita apud la domo, kaj ĉiu membro de la familio ĵetas en ĝin blankan ŝtonon, tiel markitan ke ĝi povas esti facile rekonota. Tiam ĉiuj preĝas, incitas la fajron, kaj iras domen. En la sekvanta mateno, se mankas iu el la ŝtonoj, la havinto de tiu ŝtono mortos antaŭ la finiĝo de la jaro. La sama superstiĉa kutimo okazas en Skotlando.

C. OXENFORD.

La Kongresaj kunsidoj.

Ni ne intencas paroli longe ĉi tie pri la laboraj kunsidoj: la naciaj revuoj detale ĝin faris, kaj, plue, plena raporto estas nun preparata de la Centra Oficejo. Ni donas nur mallongan resumon de l' laboroj. Unue, oni decidis — tuj de la unua kunido — en la ĉambrego de l' « Amis de l' Instruction » (Amikoj de l' Instruisteco), tute malpermesi ke, en la ĝeneralaj kunsidoj, oni diskutu pri politikoj, religiaj aŭ socialaj demandoj. Prave oni do flankklasis, en la oficiala protokolo, ĉion, kio povus naski malpacojn inter la kongresanoj.

Unu grava decido de l' kongreso rilatas la starigon de konstanta sekretario de niaj kongresoj. Konstatinte la rimarkindan helpon donitan al la organizintoj l' II^a Kongreso, de la « Esperantista Centra Oficejo », la kongresanoj ĝin elektis por la dirita ofico, elekto certe aprobita de ĉiuj samideanoj. Oni konsentis ankaŭ pri la utileco de *efoj* por esperantistoj, kies nomo estas precipe *konsulejo* en ĉiuj landoj, kie la radiko « konsul » ne estas malhelpaĵo por ĝia alprenado. Longa artikolo estas legebla en alia fakto de la gazeto pri tiu grava temo.

La Kongreso akceptis aklande la decidon de D^{ro} Zamenhof renovigi kaj fari definitivaj la poŝtojn de l' « Lingva Komitato. »

Pri tiu ĉi komitato raportis iom longe, kaj tamen neplene, Rektoro Boirac. Feliĉe D^{ro} Bein (Kabe), varme aplaudata de l' kongresanoj, montris la utilecon de l' laboroj jam faritaj de la komitato, kaj li direktis al ĝi gratulojn kaj dankojn tre meritajn.

En la raporto de Rektoro Boirac estas aparte koniginda la fakto, ke la teknikaj vortaroj estas lasataj al la privata iniciato.

La aŭtoroj, kiel la aŭtoroj de lernolibroj, estas invitataj proponi sian manuskripton al la ekzameno de l' Lingva Komitato.

Tio estas nepre necesega. Alie la L. K. pasigos sian tempon korekti lernolibrojn aŭ vortarojn enhavantajn erarojn — kiel li jam faris kaj devas ankoraŭ fari por iaj jam presitaj vortaroj; kaj, atendante, la gramatikoj ne konformaj al la « Fundamento de Esperanto » povos fari multe da malbono, instruante pri Esperanto *ne Zamenhofa*.

Tamen, nur post longa diskuto kaj post mallonga aparta interparolado kun Rektoro Boirac, la subskribonto de tiuj ĉi linioj sukcesis alpreni sian opinion: la emo de l' kondukantoj de la di-kuto estis l' optimismo, kaj ankaŭ — tre homa sento — la timo de ĉiu respondeco.


Ni jam scias pri la unuvoĉa decido de la kongresanoj rilatanta la elekton de Anglujo por la estonta kongreso.

La fizionomio de la kunsidoj estis tute rimarkinda. Multe da gekongresanoj partoprenis en ili kaj la virinoj ne estis la malplej atentaj, eĉ dum la plej seriozaj diskutoj. Kia diferenco kun tiom da internaciaj kongresoj, dum kiuj, ne komprenante unu la aliajn, la kongresanoj vizitas ĉiujn vidindaĵojn de l' lando kaj urbo, en kiuj havas lokon la kongreso, escepte de la ejoj difinitajn por la kunsidoj!

Pro tio oni devas bedaŭri ke la tagordo ne estis antaŭe konigita kaj ke, konsekvence, okazis ke kelkaj diskutoj estis haltigataj sen rezultato, pro manko de labora metodo, aŭ subite, ne lasante eblecon paroli al ĉiuj petintoj, eĉ kiam iliaj esperantistaj servoj povis esperigi al ili, ke oni bonvolus ilin aŭskulti.

Post rimarkoj faritaj de mi pri tio, dum la lasta matena kunsido, la kongreso decidis la starigon de regularo por la estontaj kongresoj.

Kun tiu pliperfektiĝo, kun la nuna konstanta kongresa sekretario, oni povas esti certa ke la estonta kongreso ne ebligos la kelkajn antaŭajn kritiketojn, kiuj ne deprenas de la Geneva kongreso ĝian valoron, kaj kiuj altrudiĝis en la supera intereso de nia afero. Ni eliras el la prova periodo de niaj kongresoj, kaj oni devas konsenti, ke estas tute rimarkinde, ke ĝi daŭris tiel mallonge.



Fot. Mallet.

« AULA » DE L'UNIVERSITATO.
Ĉambrego de l' laboraj kunsidoj.

La Geneva Kongreso estis kongresareto.

Unu el la karakterizaĵoj la plej atentindaj de la Geneva Kongreso estas ke ĝi estis, fakte, vera kongresareto. Apud la oficialaj kunsidoj, enhavitaj en la programo, okazis multaj kunsidoj de specialistoj, ĝermoj de estontaj esperantistaj kongresoj specialaj, en kiuj aliformiĝos — espereble — la nunaj babelaj kongresoj. Jam en Boulogne desegniĝis la movado; ĝi akcentiĝis en Genève, kie kuniĝis aparte scienculoj, leĝistoj, framasonoj, katolikoj, ruĝuloj, farmaciistoj, maristoj, oficiroj, pacifistoj, akciuloj de « Esperanto-Journal », ŝakludistoj, instruistoj, ĵurnalistoj, k. c.

Fine, kiel naciaj kunsidoj, ni citos tiun de l' Svisoj kaj tiun de l' francaj instruistoj, sub prezidanteco de Rektoro Boirac, en kiu oni decidis tre rimarkindan organizadon de la propagando, pri kiu ni parolos detale.

Ni ne forgesu kunvenojn en la katolikan kaj protestantan preĝejojn, en kiuj predikis Esperante: Abato Peltier (Francujo) unufianke, Pastroj Rust (Anglujo) kaj Schneeberger (Svisujo) je la alia, ĉiuj tri kunlaborantoj de « Tra la Mondo ».

Je tiu okazo, ni rimarku ke, la lastan jaron, permeso estis rifuzita al Abato Peltier prediki en Boulogne a katolika preĝejo. Bena letero, sendita de lia papa Moŝto al Abato Peltier por li kaj la redaktoroj de « Espero Katolika », ne estas fremda, sendube, je la sukceso atingita tiun ĉi jaron, pri kiu ni gratulas tre kore nian energian kunfraton.

Inter la preparitaj kunsidoj, du estas speciale atentindaj: tiu de l' scienculoj kaj tiu de l' leĝistoj. La unua, laŭ iniciato de S^{ro} H. Tarry, franca meteorologiisto, decidis fondon de « Scienca internacia sekcio », kiu ekzamenos ĉiun proponon rilatantan la propagandon de Esperanto kaj havantan sciencon karakteron. Post interesa diskuto, en kiu partoprenis diversnaciaj scienculoj, la « Scienca sekcio » aprobis la du jenajn proponojn de D^{ro} C. Bourlet, profesoro en la Lernejo de l'Artoj kaj Metioj de Paris:

« 1^o La scienculoj uzu kutime Esperanton dum la sciencaj Kongresoj internaciaj.

« 2^o La internaciaj ĵurnaloj akceptu artikolojn en Esperanto, kaj aldonu al ĉiu artikolo en lingvo nacia resumon en Esperanto. »

La scienca sekcio starigis « Konstantan internacian Oficon » komisiitan speciale por la preparado de l' teknikaj vortaroj:

La dua internacia societo fondita estas tiu de l' advokatoj, sub prezidanteco de S^{ro} A. Michaux. La afabla sekretario, advokato Sergeant, 31 Boulevard Mariette, Boulogne-sur-mer, sendos plezure ĉiujn sciigojn pri la afero, kies graveco estas facile komprenebla.

Ankaŭ fondiĝis Societo de Ŝakludistoj (*Vidu Kronikon*).

A. MONTROSIER.

Lastaj ejoj de l' Kongreso.

La Kongresanoj promenantaj.

La ekskurso en Vevey ne estis la sola farita de la kongresanoj kaj, post la kongreso, ili disveturis, anare, laŭ sia propra elekto kaj la reciprokaj simpatioj, en Savoie kaj tra Svisujo.

Ni sufiĉe parolis pri la naturaj belaĵoj de Alpoj por ne bezoni denove priskribi la lokojn vizititajn.

Sufiĉos diri, ke la vojaĝetoj estis nova okazo por pli profunde ĝui Esperanton dank'al la ŝatindaj amikecoj de ĝi naskitaj; kaj ke ili estis ankaŭ fruktoportontaj propagandaj rimedoj.

Ekz., kiam komencis la toasto sur la ŝipo *Mont-Blanc*, dum la ekskurso en Annecy kaj Aix-les-Bains, aparte kiam nia ĉarma samideano Zabilon d'Her deklamis sian delikatan poezion « Sub la faldoj de nia standardo »,



Fot. Ducommun.

LA FERDERO DE WINKELRIED.

ĉiuj ŝipveturantoj grupiĝis ĉirkaŭ nia tablo, kaj, kompreneble, oni zorge rimarkigis al ili ke, inter ni, troviĝas esperantistoj el 4 malsamaj landoj.

Ankaŭ en Aix-les-Bains, kie la esperantistoj estis akceptataj en *Grand Cercle*; ankaŭ en Chamonix, kie hoteloj estis esperantigitaj; tra Svisujo fine, flirtis venke « nia standardo ». Kaj la ĉiulandaj samideanoj, povis ofte konstati (ekzemple la meĥanikisto kaj hejtigistoj de vagonaro dum la vojaĝo estis esperantistoj!) la bonegajn rezultatojn de la energia propagando de niaj Svisaj amikoj, kies eflojn, repetitajn de l' imponantaj Alpoj, dissendis en ĉiujn partojn de l' mondo « Svisa Espero », la bonega revuo. Ĝi registris regule la rimarkindajn progresojn de nia afero dum la preparado de l' kongreso.

Al ĝi, al ĉiuj pioniroj de Esperanto en la bela kaj alloga Svisujo, koran dankon kaj merititajn gratulojn!

La kongresa Ekspozicio (*Fino*).

En la dokumenta parto, interesa bohema ekspozicio; multaj dokumentoj pleje interesaj (poŝtkartoj, albumoj, k. t. p...); muraj tabeloj por l' instruado laŭ la metodo Cart.



Fot. de F. Desmarest.

DUM LA EKSURSO EN ANNECY.

Fino Zabilon d'Her deklamas « Sub la faldoj de nia Standardo ».

Komerco: la jam bone konita Viskio Esperanto de nia amiko Buchanan; la pipoj de St Claude, kies fabrikado estis priskribata en tiu revuo bone vendiĝas. Se la « Pipamanto » ĝin havus, li ne ĝin rompus je la fino de la amuziga monologo de S-ro Pujala Valjes; la Esperantista Presa Societo okupas larĝan tablon.

Kontraŭe je la sciigo donita laŭ diro de S-ro Cart mem, administracia prez. de tiu ĉi firmo, ĝi konservas esperantistan libron. Kiel grava akciulo kaj kreditoro, « Tra la Mondo » ĝojas pri tiu avizo.


Nek en la instrua, nek en la komerca fako oni devas citi la eldonaĵojn de S-ro Cart per la Braille'a sistemo por blinduloj. Ili havas pli altan gravecon, pri kiu ofte oni ĉi tie parolis.

Deziranta utili al ia interesa celado, nia ĉefredaktoro estis petinta al S-ro Cart artikoleon, post kiu li deziris alvoki al la malavareco de niaj legantoj. La vido de l' malfeliĉaj blindulinoj ĉirkaŭantaj danke nian majstron (Anta' a n) instigu ilin, eĉ sen artikolo, partopreni, per donacoj, en la disvastiĝo de Esperanto ĉe la ĉiulandaj blinduloj (S-ro Cart, 12 Rue Soufflot, Paris).

Kvankam nia raporto pri ekspozicio estas la plej plena el tiuj presitaj, ni ne pretendas — ĝin ne volinte — ke ĝi estas plene. « Lingvo Internacia » la centra organo de l' Esperantismo, sendube donos ian tagon oficialan kaj tute plenan raporton pri la kongreso, ĉar — oni ĝin rimarkigas al ni — ĝi ne estis malĉeestanta kiel ni, kun bedaŭro, skribis vidinte nenium el la redakcio (*).

Ni nur volis altiri la atenton pri la intereso de Esperanto je la komerca vidpunkto, kaj ankaŭ iom montri al la samideanoj ilian devon kontraŭ la progresemaj komercistoj, kiuj — la unuaj — konfidis en Esperanto. Ni estus ĝoja se ni estus sukcesinta.

STELETO.



Fot. Egli.

ANTAŬ LA FORIRO TRA SVISUJO.

Vojaĝanto kaj kondukantoj samideanoj!

S-ro T. el Vilna en sia kostumo de liberemulo.

(*). Dum la korektado de l' presprovaĵoj ni ĵus ricevis kune, la 17^{an} de Novembro, la Nojn de l' 15^a de Septembro kaj 1^a de Oktobro, enhavantajn komencan de l' raporto.

La Kongresa Balo.



Fot. Mallet.

GESINJOROJ E. BERNARD.

Iom malpli multaj ol en la Boulogn'a kongreso estis la kostumoj. Sed kelkaj estis belaj kaj interesaj: jen estas ilia nomaro, plena ni kredas malgraŭ la malfacilaĵon ĝin starigi, meze de amaso el personoj promenantaj, dancantaj aŭ haltitaj ĉe la pordoj, en salonoj iom nesufiĉaj por tiom da homoj.

Unue oni rimarkas Mohammed Sher Khan, el Hindujo, kiu kompreneble, estas tre rigardata kaj ĉirkaŭata; li bone komprenas nian lingvon, sed nemulte ĝin parolas, pli pro timo ol pro neebleco; cetere estas rimarkinde ke, de l' unuaj tagoj, li jam faris takseblajn progresojn; jen estas ankaŭ S^o Page,

Skotlandano, kiu plaŭdigas sin kantante la spritan kaj iom sentimentalajn kanton « Mia Esperantistino », kies aŭtoro li estas; F^{ino} Farnes, el Londono, en maristino; S^{ino} Bisquet, el Moskva, en bela rusa kostumo; S^o Lutz, S^{viso}, en kostumo de Armalli (svisa paŝtisto); du fratinoj, F^{inoj} Jahns en Brunsviganinoj; S^o Pujula, el Barcelone, kun la katalana ĉapo; S^{ino} Baïre, el Boulogne-s-mer, edzino de l' sindona sekretario, en Boulognanino; S^o Suno Attila, kun la ĉapeto de l' finnaj studentoj; S^{ino} Theodore vestita per la kurioza kostumo de Kaimbujo (Wales, Anglujo); F^{ino} Alma Schmidheini en Vaud'ano (Svisujo). Tri oficiroj survestis sian uniformon: L^{to} K^{lo} Ayza, (Hispano); K^{no} Komandanto Lemaire (Belgujo); Leŭt^o Bayol (Francujo); L^{to} K^{lo} Pollen (Irlandano), kiu eliras de framasona kunveno, venas kun siaj specialaj ornamoj. Fine nia amiko kaj fervora propagandisto en Vilna, S^o T. survestis la kostumon de l' polaj liberemuloj, malpermesitan en Rusujo de 40 jaroj; pantalono kaj ĵako grizaj kun nigraj plataj galonaj kudritaj horizontale sur la bruston. (Vidu la paĝon 70^{an}).

Kiel ni jam diris la lastan jaron, estus dezirinde, ke la kostumoj estu pli multenombraj, ĉar ili bonege taŭgas por montregi la diversecon kaj malsimilecon de l' lingvoj kaj landoj reprezentataj en la amaso uzanta la solan lingvon Esperanto.

Por ke tiu fakto estu pli bone montrata, estus dezirinde ke, en niaj festoj, havu lokon « garden party » t. e. taga festo en ĝardeno. Trovi ĝardenon estus eble pli facile ol trovi sufiĉe grandan ĉambregon; la kostoj estus sendube malpli altaj, kaj, ĉiokaze, oni povus pli oportune inviti neesperantistojn, kiuj, certe, estus tute konvinkitaj, post kelke da horoj pasigitaj meze de esperantistoj ĉiunaciaj, pri la parolebleco de Esperanto. Al niaj anglaj amikoj, emaj je la ĝardenfestoj, ni dediĉas tiun ideon.

La Paroladoj.

Post la solena fermo de la kongreso, efektiviĝita per la himno de de Ménéil, entuziasme kantata de ĉiuj ĉeestantoj, Kapitano Komandanto Lemaire, la tre konata belga esploristo, faris belan paroladon kun lumbildoj pri siaj esploradoj en la belga Kongo. Tre interesata per la temo, ĉarmata de lia parolo facile komprenebla — ĉar la oratoro uzis nur konatajn radikojn — la publiko varme aplaudis la paroladinton kies kostumon, kaj pli ankoraŭ humanajn sentojn ni admiris. Estas efektive tute rimarkinde, ke la esploradoj de K^{to} Lemaire plenumis sen sangelfluo.

France, dum la koncerto kiu antaŭis la balon, S^o A. Michaux, alportis al niaj amikoj Genevaj la helpon de sia sprita parolo, preparante — per lerta elmondo de l' Esperantaj principoj — estontajn rekrutojn por nia afero.

AŭDINTO.

S^o Ellis, unu tre malnova angla pioniro de Esperanto, en Keighley, *solicitor*, kunfondinto de la advokata societo, partoprenis aliparte en starigo de internacia societo de ŝakludistoj, kies oficiala organo estas de nun « Espero Katolika », en kiu S^o Ellis faras, de unu jaro, ŝatatan ŝakludan kurson. Prez., Abato Peltier en S^{te} Radegonde, apud Tours (Indre & Loire).

STELETO.

Kroniko.

S^o A. Michaux al ni sendis alvokon por libro de S^o Paul Boulet, en kiu tiu ĉi donas rimedon por lerni la francan lingvon per Esperanto. La agema Prez. de l' Boulogn'a grupo opinias ke tiu libro, montrante ke Esperanto ne malutilas la francan lingvon, taŭgos por subteni la proponon de S^o Cornet kaj aliaj francaj deputitoj, kiu celas oficialan enkondukon de Esperanto en la francajn lernejojn.

Por helpi S^{on} Paul Boulet, ni volonte atentigas pri tiu libro (1 fr. 50, ĉe l' aŭtoro, 80, Bd du Prince Albert, Boulogne-s-mer) sed, laŭ ni, la plej certa rimedo por ricevi sukceson estas persone favorigi ĉiujn deputitojn, aŭ almenaŭ la plimulton.

Kiel ni raportis antaŭ kelkaj monatoj, multaj grupoj okupiĝas pri la afero laŭ invito de l' grupo de Sens kaj de S^{ro} de Beaufront, la distingita Prez. de l' franca societo, se mi ne eraras. Mi kredas ke nia agema propagandisto, l^{to} Bayol, kolektis pli ol 100 nomoj de favoraj deputitoj; la grupo de S Chamond ricevis promeson de bonvola apogo de l' *Ministro de l' Publika Instruado* mem; la nova ministro de l' Laboro, S^{ro} Viviani, estas ankaŭ favora, laŭ sciigo kiun ni ricevis de S^{ro} Th. Cart. Ĉiuj francaj grupoj, kies regionaj deputitoj ne estas jam gajnitaj al nia afero, rapidu klopodi, kaj la propono Cornet certe sukcesos!

Ni enmetis en tiun ĉi numeron avizon pri reabono por niaj tre malproksimaj abonintoj, kies jaro finiĝas kun la Dec. N^o. Ni forte petas ilin bonvoli tuj sendi sian reabonon, tiamaniere ke ni ricevu ĝin antaŭ la sendo de l' Januara numero (1907).

Tio estas absolute necesa, ĉar, post la eksperimento farita je la finiĝo de la unua ekzista jaro, ni decidis ne plu sendi eĉ unu numeron, se ni ne estas certaj pri reabono: ni daŭrigis — sen tiu certeco — liveron de la revuo dum du monatoj, kaj per tio, kun la poŝtaj elspezoj, perdis pli ol 150 frankoj. Estas tute neeble al ni fari tian perdon je ĉia abonrenoviga epoko.

Mi ricevis, tro malfrue por povu ilin utiligi, interesajn fotoĝrafojn de S^o A. Dubois, Estro de l' kolegio de Beaune; nia kunlaboranto Th. Rousseau; S^{ro} Sergeant, sek. de l' Internacia Soc. de advokatoj. Aliajn de F^{ino} Stoele, Instruistino en Svisujo, ni konservas por la estonto.

Ni kantu! ni jam ofte skribis aludante la muzikaĵojn eldonitajn de niaj britaj samideanoj. Kanti Esperante estas bone; ofte ankaŭ estas bonege kanti en gepatra lingvo, ĉar entuziasmo facile komunikigas per la muziko. Ni do rekomendas multe, por la festenoj kaj promenadoj en kiuj partoprenas francaj esperantistoj kaj neesperantistoj, la amuzigan kanteton « M'sieu Esperanto » de nia kunlaboranto kaj amiko E. Bord (Tute malkare: 60 centimoj po **dudek**, afrankite. Ĉe S^o E. Bord, Beaune, France). Ĝi kanti, as laŭ la gaja kaj konata ario « Cadet-Roussel ».

Baldaŭ alternos, kun la sporta kroniko, kroniko scienca kies redaktoro estos S^o Marcel Finot, scienculo distingita, jam konata de niaj legantoj. Kompreneble la redaktoro donos al ĝi internacian karakteron kaj ni konfidas al niaj amikoj por sendi al li interesajn dokumentojn.

Nia kunlaboranto, S^o de Guesnet, estas je la dispono de nia legantaro por doni ĉiujn informojn rilate al sportaĵoj en Francujo, recipe pri la ciklaj kaj automobilaj aferoj kaj meĥanismoj. Sin turni senpere al li, 9 Rue Chauveau-Lagarde, Chartres, Francujo.

A. MONTROSIER.

Enketo pri Skermo.

Ĝi estas malfermita de tre fervora bulgara oficiro, leŭt^o Silvestriev, kiu petas la samideanojn interesigantajn pri skermo respondi al la jenaj demandoj, koncerne sian landon:

- 1^e Historia disvolvigo de la skermo?
- 2^e Nuna stato de la skermo?
- 3^e Metodo kaj maniero por instrui la skermon?
- 4^e La uzataj skermiloj?
- 5^e La regularo por la dueloj?
- 6^e Ĉu la duelo estas nun necesaĵo. Ĉu ofte okazas dueloj Ĉu estas falsaj, ne okazantaj dueloj?

Leŭtenanto Silvestriev estus tre danka, ke oni sendu rapide respondojn. Ĝi estos ŝtofo por parolado farota, en milita klubo, pri skermo en diversaj landoj. La ideo estas bonega por interesigi oficirojn pri Esperanto. La enketanto petas ankaŭ la gazetojn bonvoli represi lian demandaron. Oni sendu la respondojn al leŭt^o Silvestriev, pioniro, Ŝumen, Bulgarujo.

Kristnasko en Svedujo.



SVEDA TIPO.

Dum la lastaj tagoj oni bakas ĉiujn specojn da pano, kukaĵoj kaj tortoj, kiuj apartenas al la sveda Kristnaska tablo.

Fine do alvenas la granda tago, la 24^{an} de Decembro, kaj nun ĉio estas preta kaj en la tuta domo regas la sento de infana ĝojo kaj feliĉo, kiu karakterizas tiun ĉi feston. Sed sur ĉiuj vizaĝoj oni rimarkas esprimon de atendo! La infanoj ĉiujminute elrigardas tra la fenestroj kaj la gepatroj ŝajnas tiel same ekscitataj kiel la junularo. Subite oni aŭdas pezajn paŝojn en la antaŭĉambro, kaj kiam estas malfermita la pordo, jen, oni ĝin vidas la belan, altan, verdan abion, kies krono preskaŭ tuŝas la plafonon, kaj, kune kun tiu ĉi simbolo de eterno espero, Kristnasko eniras niajn hejmojn kaj korojn. La Kristnaska arbo — Julgranen — estas metata en la plej granda ĉambro, kaj ĉiuj estas baldaŭ okupataj por ornamo ĝin kun kandeletoj, sukeraĵoj kaj bela artefarita neĝo. Ĉe ĝia plej alta branĉo flirtadas la sveda flago — blua kun ora kruco.

Poste oni iras al la tagmanĝo, kiu ĉe tiu ĉi okazo estas metita ne en la manĝoĉambro, sed en la kuir-ejo, kaj la familio kaj la servantoj kune sidigas je la tablo. Sur tiu ĉi troviĝas specimeno de ĉiu pano bakita, ĉiu manĝaĵo preparita kaj speciala biero, nomata « Julol ».

Sed en la mezo de la tablo staras granda kupra kaserolo enhavanta la supon, en kiu estis kuirata la ŝinko, kiu, rostita kaj ornamita per multekoloraj rubandoj, nun estas la ĉefa ornamajo de la tablo. Ĉiu nun prenas pecon da pano sur sia forko, solene ĝin trempas en la kupran kaserolon kaj manĝas ĝin. Tio ĉi estas tre antikva kutimo, kaj oni ofte nomas la 24^{an} de Decembro « la tago de l' trempado », kaj la infanoj jam longe antaŭ Kristnasko komencas kalkuli: « nun estas la tago antaŭ la tago antaŭ la tago antaŭ la trempada tago. »

Poste oni eliras por starigi la kutiman faskon da greno sur altan stangon por la birdoj, kaj al la ĉevaloj en la stablo, la brutaro, la kokinoj kaj anasoj — unuvorte, al ĉiuj domaj bestoj — estas donata speciala « festenmanĝo » el aveno kaj tritiko por ke ili ankaŭ sciu « ke nun estas Kristnasko ». En tiu tago oni volas igi ĉiun kaj ĉion feliĉa kaj kontenta, kaj el ĉiu domo oni sendas vestojn, manĝaĵojn kaj kandelojn al la malriĉuloj. Ĉiu sentas kvazaŭ oni ne povus ĝoji se estus iu en la najbaraĵo, kiu estus malsata aŭ havus nenian kandelon por lumigi sian dometon.

Je la sesa horo oni kunvenas en la salonon por trinki teon kaj poste oni babiladas, kantas, ludas la malnovajn Kristnaskajn ludojn, dancas ĉirkaŭ la Kristnaska arbo kaj manĝas pomojn, nuksojn, sekajn vinberojn, figojn kaj diversajn sukerajojn. La vespermanĝo konsistas el speciale preparita fiŝo nomata « lutfisk », rizo kaj buterotortoj. Antaŭ ol manĝi la rizon, ĉiu devas diri malgrandan rimon ŝercan, akompanata de la gaja rido de l' aliaj. Poste estas disdonataj la Kristnaskaj donacoj, ĉiu enmetita en sigelitan poŝtaĵon kun la nomo de l'



SVEDA TIPO.

La du Haroj de l'Okazo

Unuakta proverbo de JULIEN BERR DE TURIQUE (Francujo).

PERSONOJ.

GENEVIEV'. — JOHANO.

Salono en kies malantaŭo estas pordo, kiel eble plej larĝa, malfermiĝanta antaŭ parko, se oni volas... aŭ pli ĝuste, se oni povas. Mebloj laŭguste. Meze de la scenejo, malgranda skribotablo, antaŭ kiu estas seĝo.

Ĉe la levigo de l' kurteno, Geneviev' eniras tra la pordo. Kampara tualetto. Ŝi portas ĉapelon kaj tenas malfermitan sunombrelon, kiun ŝi fermas kiam ŝi estas sur la scenejo aŭ antaŭ ol eniri, laŭ la larĝeco de la pordo. Ŝi restas unu momenton apud la sojlo, revema, poste iras meti sian sunombrelon sur meblon. Tion ĉi farinte, ŝi trapaŝegas la salonon dum kelkaj sekundoj, kun la kapo mallevita, kiel tre korena persono, kaj fine sin lasas fali sur la seĝon, apud la skribotablo, meze de l' scenejo. Silento. Fine, ŝia malkontento eksplodas, kaj per la pugno ŝi frapas la tablon.

GENEVIEV'. — Ne! kiel malsprita mi estis! Kiel malsprita mi estis! Pro tio mi plorus!

(Nova silento. Ŝi estas repremegata de pripensoj kredeble malĝojaj. La junulino ludanta tiun ĉi rolon ne devas timi montri multe da malĝojeco.)

JOHANO. — Ha! Jen ŝi estas.

(Li ĵus aperis en la malantaŭo de l' salono, kaj sin apogas sur la pordo, rigardadante Genevievon per admira rigardo. La junulo prenanta sur sin tiun ĉi rolon ne devas timi montri multe da admireco.)

GENEVIEV', al si mem, kaj ne vidante Johanon, kompreneble, ĉar se tiel ne estus, jam ne estus teatraĵo. — Tion mi neniam pardonos al mi! Preterlasi tiel belan okazon! Ne! Sed kial mi estis malsprita tigrade? Kial?

JOHANO, al si mem. — Ŝi estas belega! Ha! kial mi estis tiel mallerta? Mi sendube ŝin timigis, eble ŝin ofendis... kaj nun! ŝi tuj ekmalamos min.

GENEVIEV', ĉiam al si mem. — Sed kiel klarigi tiun subitan timon, kiu min ekprenis, kiam li komencis sian amkonfesion.

JOHANO, sama ludo. — Ŝajnas, ke ŝi parolas tute sola... Ha! Ŝin aŭdi laŭte pensantan! Se mi kuraĝus!... *(Li faras movon kvazaŭ li antaŭenirus per la pinto de l' piedoj, sed li ŝanĝas sian decidon, kaj reiras al sia loko, apud la pordo.)* Ne! Tio estus malbone agi! Mi ne havas rajton aŭskulti.

GENEVIEV', sama ludo. — Tio estis tiel simpla. Ĉar li estis tuj dironta, ke li min amas, mi devis lasi lin paroli. Tiumaniere, l'afero estus aranĝita. Eĉ, laŭ la cirkonstancoj, mi ne bezonis respondi al li. Mia silento estus estinta kvazaŭ aprobo. Kaj nun, tio estus farita! Ni jam estus konsentaj... kaj restus nur, ke pri tio mi antaŭsciigu miajn gepatrojn. *(Al la publiko, kvazaŭ ŝi kredus diveni kontraŭparolon de ĉeestanto)* Ho! pri tiu ĉi rilato, la plej malgrava dubo estas nebla... Mi estas certa pri la konsento de miaj gepatroj! *(Kun ĉagrenita mieno)* kaj nun, ĉio estas detruita! *(Ĉiam al la publiko kvazaŭ ŝi repuŝus kontraŭdiron de alia aŭskultanto.)* Sed jes, mi certigas al vi, ĉio estas detruita, absolute detruita..., ĉar, ĉe la unua frazo iom amema elparolita de li, mi forkuris kiel ŝtelistino..., aŭ pli ĝuste, kvazaŭ mi parolus kun ŝtelisto! Li certe kredas, ke li malplaĉas al mi!... aŭ ke mi estas nur malspritulino! Kaj en ambaŭ okazoj, tio estas pli ol sufiĉa por decidi lin forlasi la projekton edziĝi je mi! *(Ekĝemo)* Nu! Jen mia feliĉo maltrafito! Kaj tio estas mia kulpo!

JOHANO, ĉiam ĉe la pordo kaj al si mem. — Mi

donus dudekkvin orerojn por scii, kion ŝi murmuretas!

GENEVIEV', sama ludo. — Tial ke mi rifuzas esti lia edzino, aŭ pli ĝuste tial ke li imagas, ke mi tion rifuzas, li certe ne restos fraŭlo kaj li tuj ekamos alian! Ha! Dio mia! Se nur ŝi ne estos Berto! Egoistino! Koketemulino!... kiu igos lin tre malfeliĉa! Kiel ŝi faras al li amindumajn okulojn! Kaj ĉiam apud li aŭ ĉe liaj kalkanumoj! *(Imitante l' akran voĉon de Berto)* « Sinjor' Johano, ĉu vi venas kun mi en la ludejon de la «tennis»? Sinjor' Johano, ludadon de « ping-pong »? » *(Reprenante sian naturan voĉon)*. Ha! Se antaŭ momento, al ŝi li estus farinta sian amkonfesion, ŝi ne estus montrinta sin tiel malsprita kiel mi!

JOHANO, ĉiam samloke kaj samlude. — Io turmentas ŝin, tio estas certa. Kiu scias! Ŝi eble koleras pri mi?

GENEVIEV', metante siajn du brakojn sur la tablon, kaj sur ilin lasante fali sian kapon. — Ha! Dio mia! Kiel malfeliĉa mi estas!

JOHANO. — Bone! Jen ŝi ploras, nun! Kaj tio estas mia kulpo, mi tute ne dubas pri tio. Mi tute maltrankviligis ŝin. Ha! Triobla malspritulo! *(Al si li donas pugnobaton; sed li tro forte frapis, kaj nevole elĵetas dolorkrion.)* Tio estas mallerta, mi malbonfaris al mi!

GENEVIEV', vivece stariĝante pro la bruo. — Hem! kiu estas tie? *(Ŝi turnas sin, kaj ekrigardas ĉirkaŭ la salono, sed nenion vidas, ĉar Johano havis tempon por sin kaŝi malantaŭ la pordon.)* Vere! Estas kurioze konstati, ke estas neniu. Jen en kia stato mi estas. Mia sufero estas tiel forta, ke mi havas halucinaciojn. *(Ŝi rigardas rekte la publikon.)*

JOHANO, vidigante nur sian kapon tra la enkadriĝo de l' pordo. — Mi malmulte mankis, por ke mi estu vidata.

GENEVIEV', starante, al la publiko, post momento, ekĝemante. — Nu! Mia sorto estas skribita! Mi restos maljuna fraŭlino... ĉar mi estas tre decida neniam edziniĝi je alia... Ho! ne! Neniam! Neniam! kaj ĉio tio ĉi okazis, tial ke en la bona momento ne alestis mia spriteco. Vere! Tio estas neklarigebla afero! Se almenaŭ mi estus nature timema... Sed mi tute ne estas timema! Aŭ eĉ, se mi ne estus antaŭvidinta tiun amkonfesion... Sed mi absolute ĝin atendis, ĉar mi tre bone rimarkis la simpatian, kiun mi estis naskinta en li! Kaj, kio estas kurioza, kio estas ĉagrenega, tio estas ke mi antaŭe preparis, kion mi respondos al li, kiam al mi li konfesos sian

amon. Je mia fido!... vi komprenas... Mi deziris ne ŝajni al li tro malsprita, kaj ankaŭ nenion forgesi pri la gravaj aferoj, kiujn konvenis diri al li en tiu solena momento. (*Kun kontento.*) Ĝi estas eĉ sufiĉe beleta, mia parolado. (*Ekgemo.*) Malfeliĉa parolado. Neniam plu iu ĝin aŭdos. Ĝi kaj mi estas kondamnita resti neeldonitaj. (*Silento. Ŝi residigas antaŭ la tablo.*) Kaj, tamen, se li aŭdus tiun paroladon, sendube li estus kortuŝata. (*Parolante al imaga interparolanto.*) Vi diras, ke vi min amas, Sinjor' Johano, kaj al mi vi demandas, ĉu tia konfeso, de vi venanta, ofendas min? Ne. Ĝi ne min ofendas. Kaj por esti sincera, mi devas konfesi, ke mi estas tre feliĉa, ho! jes, tre feliĉa ĝin aŭdante el via buŝo.

JOHANO. — Estas nenia dubo. Ŝi deklamas monologon. (*Li nekonscie alproksimiĝas per kelkaj paŝoj kaj, por peni aŭdi, faras per sia mano korneton ĉe sia orelo.*)

GENEVIEV', *daŭrigante; sama ludo.* — Ĉu mi devas diri ĉion al vi? Mi ĝin atendis, tiun konfeson. Sed, mi vin petegas, antaŭ ol ligi vin kun mi, bone konsiliĝu kun via koro. Ofte, sub la favora impresado de momento, tial ke la suno orumis hararon, aŭ ke nehela lumeco poeziigis sintenadon, fine ke oni estis gaja..., aŭ ke oni estis malĝoja, oni imagas, ke oni sentas novajn kaj definitivajn sentojn... Sed, iaforte, ili tute ne estas definitivaj..., kaj kiam la suno plu ne orumas la hararon, aŭ kiam nehela lumeco plu ne poeziigas la sintenadon..., finita, iluzio! Kaj, tiam, kia suferado por l'alia... kiu kredis ilin eternaj!

JOHANO, *kiu nesentebly proksimiĝis.* — Kiel vera estas tio, kion ŝi ĵus diris! Sed al kiu do ŝi parolas?

GENEVIEV', *daŭrigante; sama ludo.* — Pro tio, mia kara Sinjor' Johano...

JOHANO, *kiu aŭdis, miregigita.* — Hem? al mi? (*Li ankoraŭ proksimiĝas.*)

GENEVIEV', *sama ludo.* — Pro tio, antaŭ ol permesi ke vi petu miajn gepatrojn, ke ili min donu al vi kiel edzinon, mi petegas, ke vi penadu koni min. Mi havas malbonaĵojn.

JOHANO, *nevole.* — Tio ne estas vera.

GENEVIEV', *surprizata.* — Hem? (*al la publiko.*) Kiu diris: « Tio ne estas vera? » (*Ŝi turnas sin; sed jam, kiel antaŭe, Johano havis tempon por sin kaŝi malantaŭ la pordon. Kaj neniun vidas Geneviev'.*) (*Al la publiko.*) Mi ne eraris; tio estas halucinacioj. (*Reprenante sian paroladon.*) Mi havas malbonaĵojn: unue, mi estas iom obstinema.

JOHANO. *Li revenis per la pinto de l' piedoj, kaj al la publiko, metante unu fingron sur sian buŝon.*

— Nun, eĉ se ŝi certigos, ke ŝi perfide mortigis sian tutan familion, mi havos la lipojn kudritaj.

GENEVIEV', *daŭrigante, sama ludo.* — Mi estas ankaŭ iom frandema, eble. (*Johano signas, ke tio estas bona.*) Mi abomenas la muzikon. Por nenio en la mondo, oni devigus min sidigi ĉe fortepiano! (*Johano kontente frotadas siajn manojn.*) Mi malŝategas la balojn, la promenadojn, la tutan falsan brilon kaj la tutan artefaritecon, el kiu konsistas l' ekzistado de miaj amikinoj. (*Johano sendas kisojn al ŝi.*) Kaj poste, mi havas halucinaciojn. (*Rideto de Johano.*) Fine, vi tion vidas, Sinjor' Johano, mi ne estas unu el tiuj virinoj pro kiu la edzo rajtas fierigi.

JOHANO, *flanken.* — Ne! Se oni estus elfarinta ŝin speciale por mi!...

GENEVIEV' *levigis kaj, post momento, al la publiko.* — Jes, jen estas tio, kion mi devis diri al li..., anstataŭ forkuri rapidege, kiel knabineto timanta esti manĝata de l' timegigulo... kaj eble, kiu scias? Malgraŭ tiu konfidencio, li daŭrigus sian intencon edziĝi je mi! (*Kun iomete da koketeco.*) Eĉ mi havas ideon, ke li persistus. (*Ekgemo.*) Kaj, nur, por Berto sendube, por tiu malagrabra Berto estos liaj amindumoj! Ha! Dio mia! Kiel malsprita mi estis! Kiel malsprita mi estis! Preterlasi tian okazon! Kaj ĝi plu ne sin prezentos, ĉar ĝi havas nur unu haron, la okazo!

JOHANO, *ravita, entuziasmigita, rapidege sin ĵetante antaŭ la genuojn de Geneviev'.* — Ne! Ĝi havas du?

GENEVIEV', *miregante.* — Hem? Vi! Sinjor' Johano! Vi estis tie ĉi?

JOHANO. — Jes, fraŭlino, kaj ĉion mi aŭdis!

GENEVIEV'. Tiam... vi... vi ne sentas vengdeziron al mi, tial ke mi forkuris tiel rapide?

JOHANO. — Ne, ĉar mi rekuniĝis kun vi! (*Li prenas ŝian manon, kaj ĝin kovras je kisoj.*) Sed nun, mi jam ne vin ellasas!

(*En la kuliso oni aŭdas akran voĉon*): Sinjor' Johano, ludadon de « pingpong! »

GENEVIEV' *timigita.* — Ĝi estas Berto! Vi tuj ludos kun ŝi?

JOHANO. — Jes. Por ne ŝajni ke mi ŝajnas... ĝis niaj fianĉiĝoj estos oficialaj. Sed, estu trankvila... Ŝi perdos la ludadon... (*Kisante ŝian manon*) ĉar vi estas gajinta ĝin.

Kun permeso de l'aŭtoro *Esperantigis,*

JOHANINO FLOURENS.

INTERNACIA INTERŜANĜO * ESPERANTO * (I. I. E.) — REGULARO.

ART. I. — Inter ĉiuj personoj, kiuj akceptas la sekvantan regularon, estas fondita Societo, kiu prenas la titolon: *Internacia Interŝanĝo Esperanto. (I. I. E.)*

ART. II. — La Societo celas la disvastiĝon de la Lingvo Esperanto, per la interŝanĝo de ilustritaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj.

ART. III. — La jara kotizaĵo estas fiksita je 2 Frankoj, kaj donas la sekvantajn profitojn:

1^o Senpagan abonon al l'*Annuaire philatélique*, oficiala organo de I. I. E.

2^o Senpagan anoncon je kvar linioj, kaj ses enpresaĵoj en la oficialan nomaron de la Interŝanĝistoj.

3^o 20 % da rabato je la ordinara prezaro de la ĵurnalo.

ART. IV. — L'*annuaire philatélique* publikigas ĉiumonate la nomaron de la novaj societanoj, kune kun la numeron de ilia enskribo.

ART. V. — Esperantaj konkursoj (kun premioj poŝtmarkaj, ilustritkartaj kaj filatelaj), okazos ĉiujare je difinitaj epokoj.

ART. VI. — La dekunaj societanoj estos « *Fondintaj Membroj* », kaj pro tio, pagos nenian kotizaĵon.

ART. VII. — La aliĝoj estas ricevataj de *Sinjoro Maurice Fosse*, administranto de I. I. E. 37, rue Bouchette en CHARLEROI (Belĝujo), kaj ĉe la Oficejo de l'*Annuaire philatélique*, oficiala organo de la Societo I. I. E., 10, Rue Dominique, TROYES (Francujo).

Ĉe la soldatejo.

Rakonto de S^o ED. TEYSSONNEAU, ano de l' Grupo de « Charenton ».

Kaj vi, kion vi faris antaŭ ol veni en la regimenton?

— Seminariano mi estis, Sinjoro.

Seminariano! kaj en la dormoĉambro estis kiel pulvtreno: ha! nu! oni estis ridonta iom pri la ekleziulo?

Kaj jam la maljunaj soldatoj, la kapoj «fortaj», kutimintaj al facilaj ŝercoj, pretiĝis por bone ricevi tiun.

Kiel multe li baldaŭ konatiĝos kun *la kovrilo, la nestaranta lito, la noktavizito* (1) k. t. p.

En la ĉambrego, la rekrutoj atendas. Tra la unuaj oktobraj nebulegoj, la trumpeto ĵetas la klarajn notojn de la vesperalvoko, kiuj sonas sub la sonor-emaj arkajoj de la soldatejo; kun korpremo, la junaj militistoj aŭdas la unuan fojon, atentis; kelke da ili kaŝeme forviŝas larmon; sed ĉiuj estas fieraj: ĉu ili ne estas tie por partopreni en «la grava laboro»!

«Al viaj litoj! silentu por la nomalvoko», diras la korporalo tuj je l'eniro de la semajnula serĝento, movante sian fumantan lampon vice antaŭ la soldatoj ordiĝintaj ĉe la piedo de l' litoj.

Post la alvoko, la serĝento notas, kaj foriras; oni aŭdas liajn paŝojn resonantajn sur la cemento de longaj koridoroj; la ĉambro denove bruiĝas. Grupetoj formiĝas: oni parolas mallaŭte, inter la malnovuloj, pri la bonaj petolaĵoj, kiujn oni faros al la «bluaj» (2).

Kaj li, la malfeliĉa eta seminariano, ĝenata en siaj civilaj vestoj, kiujn li ne plu kutimas havi, turnas kaj returnas cent fojojn mallerte la belegan kolekton da brosoj, butenoj, la kudrilaron k. t. p., kiuj plenigas lian tornistran.

Li ne kuraĝas paroli, timante malbone paroli; li ne povas, kiel aliaj, forpeli per la artifika ebrieco, kiun kaŭzas la bonvena vino, siajn timojn kaj enuojn; li pensadas...

Apenaŭ li interŝanĝas kelkajn vortojn kun malnovulo, sia litnajbaro, kiu al li fiere montras, kiamaniere oni devas kuŝiĝi ĉe la regimento. Akra odoro de tabako plenigas la ĉambron, la malseri-ozaj paroloj interŝanĝiĝas de lito al lito, sed malpli tamen of kutime. Ĉar kun tiu grandanimo de l' popolo, kiu tion respektas, kio estas nobla, oni preskaŭ timas, inter tiuj ĉi kutime senhontemuloj, ke oni ofendu la malfeliĉan infanon.

Tiam simple, senfanfarone, humile, kiel ankaŭ sen falsa honto, li genufleksas ĉe l' piedo de la lito, kaj antaŭ bajonetglavo krucforma, — malgaja ironio por tiu, kiu iam devos prediki la pacon, — li preĝas Dion, kvazaŭ li estus sola: «O Dio, faru ke mi ne verŝu sangon, kaj ankaŭ ke mi trovu sufiĉe da forto kaj kuraĝo por plenumi mian militan devon, se tio estos iam necesa.» Kaj tiu ĉi soldatamaso kutime bruanta ĉesigis siajn ŝercojn; instinkte la pipoj malleviĝis, silento fariĝis antaŭ tiu ĉi ago tiel sim-

pla; oni ne plu ridas, oni miras! kion? Tiun kuraĝon multe pli grandan ol la milita indo de la heroo, kiun vivigas malpaco kaj batalo, la kuraĝon de ĉi tiu senbarba infano trankvile preĝanta meze de homoj malsamaj, nature skeptikaj, profesie skeptikaj, popolanoj, kiuj jam de longatempе perdis la kutimon de l' preĝo.

En la apudaj ĉambregoj, la malnovaj militistoj ridindege kovrintaj sian kapon per kusenoj, kaj vestitaj per kvazaŭ oficirjakoj, trudis al la rekrutoj korpekmamenon, renversis la lito-stablojn, superakvis la novulojn.

En la ĉambrego de l' seminariano ĉie regis profunda silento.

Oni ne kuraĝis timigi la infanon.

Perfekta soldato, ĉiam dolĉa, plenumanta sian devon facile, sen malforteco, li tiel simple portis pafilon, kiel li diris sian preĝon

Unufoje nur li distriĝis: oni estis en manovrakampo por ĝenerala parado; rajdanto sur ĉevalo furioziĝinta frakasis sian kranion kontraŭ municia veturilo apud li. La soldato ne havis tempon por peti permeson eliri el vico; li antaŭensaltis kaj, surgenu li kolektis rapide la kelkajn vortojn pentajn de la mortanto, kaj en la kadro de l' batalordigitaj regimentoj, meze de l' sono de trumpetoj, kiuj salutis la alvenon de l' ĉefgeneralo, li akompanis kun siaj preĝoj animon forflugantan; poste li revenis al sia loko en la vicon, kaj kiam pasis antaŭ li la belege vestita skadro de l' stabo, la soldato, kiel ĉiuj, prezentis la armilojn.

Hodiaŭ la juna pastro pagis sian ŝuldon al la patrujo, li zorgadas en malgranda paroĥo kampara pri la aferoj de Dio; sed li konis la homojn, vivis ilian vivon, partoprenis iliajn lacecojn kaj ĝojojn kaj suferojn; li konas ilin, ilin estimas kaj senkul-pigas, ĉar li ilin konas, kaj scias, ke la malamo al pastro, malamo blinda, ne pripensita, ekzistas nur ŝajne, ke la pastreco kaj kuraĝo imponas eĉ la plej kontraŭulojn; kaj al la multaj faroj meritantaj, kiujn Dio enskribas ĉiutage por sia modesta servisto, li ne forgesos aldoni ke lia ĉeesto en la regimento estis bona agado, ke li sciis revoki al bono, per ekzemplo sia, animojn erarintajn, kaj lasi ankoraŭ, en la ĉambrego, kie oni longatempе pri li parolas, memoron de sia suferpovo, de sia submetiĝo, de sia plena obeo, de siaj bonegaj sentoj kamaradaj; kaj multaj el tiuj, kiuj lin akceptis mokeme kaj skeptike, eble retrovis, lin memorante, preĝon, kiun ili estis forgesintaj.

«Ha! ofte diras ia malnovulo, tiu ĉi estis vera soldato» kaj li aldonas, kiel mira konkludo:

«Kaj li estis ankaŭ bonega *bougre* (3)».

Trad. L. RIGOUR,
sekretario de l' grupo de «Charenton».

(1) Ŝercaĵoj antaŭe uzitaj en la regimentoj.

(2) Tiamaniere oni nomas en Francujo la novajn rekrutojn.

(3) Popola franca esprimo ne tradukebla Esperanten; signifas amindan, ŝatindan kunulon.

Infana kristnaska rakonto

de F^{ino} ODILINO PRUDENT (Francujo).

Ĝi estis la vespero antaŭ la kristnaska tago, kaj Joĉjo tre ĝojis ĉar li scias, ke, tiun ĉi nokton mem, Jesuo malsupreniros en la kamenon kaj metos belan donacon en liajn malgrandajn lignoŝuojn, kiel li faris ĉiujare de la tempo kiam Joĉjo povas memori. (Joĉjo estas kvarjara).

La lastan jaron, li trovis en la fajrejo sian grandan mehanikan ĉevalon; sed hodiaŭ li fervore deziras oficiran kostumon, kaj lia patrino ĉi-vespere petigis ĝin de li en lia preĝeto.

Kiel aminda estas tiu ĉi Jesuo, kiu sidas en la ĉielo, venante sur la teron por alporti donacojn al la saĝaj infanoj! pensas la knabeto.

Tial, tiun ĉi lastan semajnon, Johano estis tre obeema por plaĉi al Jesuo kaj ricevi la karan kostumon de oficiro.

Tamen, en si mem li pensas, ke li estis saĝa nur dum kelkaj tagoj por meriti tian donacon, kaj iom maltrankvile, li demandas sin mem, ĉu la dia infano aŭskultis lian preĝeton....

Kiel ĉio estis mistera tiun ĉi vesperon! Ĉiu sendube estis preparinta sin por ricevi Jesuon. Sed, stranga afero, la patrino de Johano estis subite malsaniĝinta, kaj la patro estis ordoninta, ke Johano restu en sia ĉambro; vidante, ke sia patrineto bezonas dormi, li diris: « Stranga afero, vere! stranga antaŭkristnaska tago! »

Se Jesuo ne estus venonta la baldaŭan nokton, volonte nia knabeto estus elirinta por scii tion, kio

okazas en la alia parto de la domo; sed por havi la noktan donacon, li devas obei sian patron.

Kiam la kuracisto malsupreniris la ŝtuparon proksiman de lia ĉambro, Johano tamen iom malferminte la pordon, ekaŭdis tiun ĉi signifan frazon: « Ne pre li venos tiun ĉi nokton ». Kaj senbrue referminte la pordon: « Jes, jes li venos tiun ĉi nokton », diris Johano.

La vartistino, kiu venis por lia vespermanĝo kaj kuŝigo certigis al li, ke ŝi mem metos liajn ŝuojn en la fajrejon de la patrino ĉambro, kiel kutime.

Malgraŭ tiuj ĉi bonaj paroloj, Johano ne povis ekdormi; mil aperaĵoj de oficiraj kostumoj ruĝaj kaj oraj vizitadis lian infanan cerbon.

La morgaŭan tagon jam de longe li estis vekiginta, kiam la vartistino alvenis por vesti lin. Fine oni permesis al li aliri por vidi tion, kion Jesuo estas lokinta en liajn lignoŝuojn.

En la ĉambro la Patrineto estas trankvila sur sia lito, sed ŝi ne ŝajnas malsana kaj la patreto estas tre ĝoja.

Johano ne estis kuraĝinta rigardi en la kamenon antaŭ ol kisi siajn gepatrojn, sed poste, turnante sin, li ekvidis antaŭ la fajrejo, malgrandan, blankan, puntan lulilon, kaj en ĝi, ĉarman rozkoloran infanon. « Oh nun! ekkriis Johano, Jesuo, Jesuo, kiu ne povis resupreniri! »

Kara ĉarmuleto! ne, ĝi ne estis Jesuo, sed lia donaco: frateto. OD. PRUDENT.



Amuzaĵoj pri la forto de inercio.




Fig. 1a.



Fig. 1b.

Oni nomas *inercio* la kapablon, laŭ kiu ia korpo en stato de ripozo aŭ de movado restadas en tiu ĉi stato, ĝis alia forto efikas sur ĝin.

Jen kelkaj simplaj provoj, montrantaj la forton de inercio de P korpoj.

A. Mi metas tri monerojn de sama grando (Fig. 1) tiamaniere, ke la du plej malproksimaj moneroj tuŝas unu la alian. Per rapida formovo per la fingro mi puŝas kiel eble plej forte la apartkuŝantan moneron kontraŭ la du aliajn, kaj vidu! anstataŭ ol forpuŝi ambaŭ el ilia loko, la pli malproksima translokiĝas, dum la meza ne moviĝas.

La forto, komunikita al la pli proksima trapasas tiun ĉi, kaj estas transigata al la alia (Fig. 1).

B Mi kunigas rektangule du trabetojn kaj fiksas ilin sur tableto. Mi pendigas sur tiu pendigileton per ses samlongaj fadenoj ses sintuŝantajn buletojn aŭ perlojn. Se mi altigas la maldekstran eksteran buleton kaj mi ellasas ĝin tiamaniere, ke ĝi ektuŝas la flankan, oni rimarkas ke la kvar mezaj buletoj restas senmovaj, dum la dekstra ekstera estas altigata kaj forpuŝata. La movado




Fig. 3.

do trapasis la kvar mezajn buletojn por efiki sur la eksteran. (Fig. 2.)

C. Mi metas sur karteton moneron kaj metas ĝin sur glason. Nun mi forpuŝas per subita ekmove la karton, kaj la monero falas vertikale en la glason. (Fig. 3.)

D. Post iom da ekzercado oni povas ankoraŭ igi pli mirinda tiun ŝonglaĵon. Por tio mi metas la karteton kaj la moneron sur mian maldekstran montran fingron; mi forpuŝos kiel eble plej forte la karteton per rapida fingrekmove, kaj... la monero troviĝas senmove sur la pinto de mia fingro. Sed tio postulas, mi repetas, iom da antaŭa ekzercado. (Fig. 4)



Fig. 4.

El « De Lusthof »

ANATUS.



Fig. 2.



ĈUTAGA SVEDA KOSTUMO.

ricevonto kaj ŝerca versajeto. Dum la tuta vespero ĉiuj ĉambroj estas feste iluminitaj, ĉar ĉe Kristnasko ne devas esti ombro ia, nek en la domo, nek en la koro. La kristnaska abio estas pli luma ol ĉio alia, kaj en la dolĉaj radioj de ĝiaj kandeletoj oni momente forgesas la konfliktojn de l' ĉiutaga vivo.

La sekvantan matenon oni ofte devas leviĝi je la kvara horo, ĉar en tiu tago Diservo komencas jam je la sesa horo, kaj multaj devas veturi pli ol 10 kilometrojn ĝis la preĝejo. Kiom estas belege, kiam la glitveturilo rapide antaŭen flugas tra l' arbaro neĝokovrita, dum la steloj ankoraŭ briletas sur nokta ĉielo, kaj oni aŭdas la gajan sonon de centoj da sonoriletoj apartenantaj al aliaj glitveturiloj, kiuj el ĉiuj flankoj alvenas la saman preĝejon. En ĉiu domo, eĉ la plej malgranda kaj mizera dometo, la fenestroj estas iluminitaj per du aŭ kvar kandeloidoj, kies radioj parolas al la preterpasantoj pri la Festo de Lumo kaj Ĝojo. Kaj en la preĝejo eksonas la malnova Kristnaska himno: « Ni Vin salutas, ho, bela mateno ».

H. C. D.



La Feliĉo

de EDMUND BIEDER.

Du malĝojaj animoj iris al la steloj persekutante la feliĉon. Ambaŭ animoj estis junaj, sed malĝojaj.

Sur la vojo ili renkontis grizharan maljunulon, al kiu la laboroj kaj penoj sulkigis la vizaĝon. En la okuloj de l' maljunulo bruletis fajro de l' juneco kaj grandega kredo.

— Kial vi estas malĝojaj, ho animoj, kaj kien vi iras? — demandis la maljunulo.

— Ni suĉis la malĝojon el la brusto de la patrino tera. La vivo jetis sablon en niajn okulojn, belajn kaj sanktajn aferojn ni vidis en la koto. La junajflugiloj, kiuj iam celis la sunon, malleviĝis, kaj restis en ni nur granda deziro de l' feliĉo. Ne ekzistas la feliĉo sur la tero, ni do iras al la steloj; tie loĝas la feliĉo, kiel certigas la poetoj.

— La feliĉo ekzistas nek sur la steloj, nek sur la tero, ĝi estas en viaj animoj. Serĉu la feliĉon en vi, ne sur la steloj — diris la maljunulo kaj foriris.

La animoj revenis sur la teron.

En silenta blua luna nokto, saturita de l' odoro de akacioj kaj de ekflorantaj jasmenoj kaj siringoj, ili promenis en la parko, ebriaj de la luna nokto, kiu sendis al ili siajn kisojn kaj nar-kotis la sentojn.

De la herboj kaj florbedoj penetris al ili strange dolĉaj odoroj.

Ili iris en la silento de l' somera vespero karese sin premante unu al alia. Ŝi kun grandaj nebulaj revemaj okuloj, rigardantaj fikse la lunon diskon; li kun mallevita kapo...

Antaŭ momento li diris al ŝi ĉion..

Ankaŭ ŝi al li...

Kaj poste... poste... li kisis ŝian freŝan buŝon, ŝiajn helajn harojn, svenantajn okulojn...

Kaj nun brako ĉe brako ili iras kaj parolas per la okuloj...

Lanugo de rozaj floroj falas sur iliajn kapojn...

— Kie estas la feliĉo?... — demandis ia konata voĉo, en la silento de l' vespero.

— La feliĉo estas en niaj animoj — respondis ambaŭ.

Kaj poste, kiam venis la plorgejoj de l' aŭtunaj ventoj kaj la seniluziigo de l' vivo, kiam la sorto forŝiris unu animon de la alia, kaj poste ree kunigis ilin, kiam nur maldolĉo restis al ili, ree aperis la maljunulo kaj demandis:

— Kie estas la feliĉo?

— La feliĉo ne ekzistas — respondis la animoj.

— Ĉu vi serĉis ĝin en vi? — demandis la maljunulo.

— Ni serĉis kaj trovis, sed ĝi mallonge daŭris kaj estingiĝis; hodiaŭ maldolĉo plenigas niajn animojn.

— Kial vi ne serĉas la perditan feliĉon?... Eble vi retrovos ĝin.

— Por kio? Por ree ĝin perdi, aŭ tute ne trovi?

La maljunulo respondis:


— Serĉu la feliĉon! La celado al la feliĉo estas feliĉo!...

El la pola lingvo tradukis

KABE.



FESTA VIRINA KOSTUMO.



ORNAMO EL LA « BETLEMO » DE MIK-ALÈS.

Kristnasko ĉe la Bohemoj.

(De FRANT. K. SVACINA).

Nia amiko T. Svacina priskribas ĉi sube kuriozajn kristnaskajn kutimojn el Bohemujo. La ilustraĵoj estas elĉerpitaj el bildaroj pentritaj de eminenta bohema artisto Mik-Alès.

Kun la multaj figuroj, pentritaj laŭ la naciaj bohemaj popolaj vestoj, la infanoj faras por si *Betlemon*.

En multaj vilaĝoj aŭ urboj, la gelernantoj ludas ankaŭ diversajn kristnaskajn teatraĵojn kun kantoj.

En Aŭstrio krom aliaj laudoj troviĝas ankaŭ regnolando Bohemujo. En tiu ĉi lando vivas du nacioj: Bohemoj kaj parte Germanoj, ambaŭ preskaŭ ĉiuj roma-katolikoj krom nemultaj protestantoj, hebreoj. Eble ĉiu kristana popolo havas siajn proprajn kutimojn, precipe dum la kristnaskaj festoj. En tiu ĉi artikoleto, mi penas priskribi, almenaŭ parte, bohemajn kutimojn dum la kristnaskaj antaŭtago kaj nokto.

La tagon antaŭ Kristnasko-festo — do la 24^{am} de Decembro — nomas la Bohemoj « Stedry den » (Malavara tago) kaj la vesperon ili nomas « Stedry vecer » (Malavara vespero.) Ĉiuj homoj — grandaj kaj malgrandaj, riĉaj kaj malriĉaj — tre ĝojas en tiu ĉi tago kaj vespero kaj ĉiu, kiu nur iom povas, penas pasigi ĝin apud gepatroj.

Dum la tuta suprenomita tago kaj vespero estas granda fasto, la piaj homoj ne manĝas ĝis vespere; manĝi viandon estas tute malpermesita krom fiŝoj. La gepatroj diras al infanoj: « Infanoj, vi devas hodiaŭ fasti, por ke vi ekvidu la « oran porketon » (= zlaté prasátko)! Tiu ĉi dirmaniero estas disvastigita en la tuta Bohemujo. Kiam komencas krepuskiĝi (ĉirkaŭ la 5^a horo), iradas en vilaĝojn la paŝtisto kun sia ligna trumpeto, kaj trumpetas kristnaskajn pastorelojn (ludojn, kantojn) apud la fenestroj de loĝejoj, kaj samtempe li diras: « Mi deziras al Vi feliĉan kaj gajan Kristnaskon, kaj ke Vi ĝoju post morto tie, kie ĝojas virgulino Mario kaj ĉiuj sanktuloj kun Kristo! » — Kompreneble, la mastrino tuj lin malavare rekompencas. — En la Kristnaska antaŭtago la mastrino kuiras pizojn por

kokinoj, kaj zorge observas, por ke neniu el la familianoj manĝu da ili, ĉar kiu pizojn manĝus, tiu ĉi havus tiom da abscesoj sur sian korpon.

Vespere ĉiuj familianoj preĝas la rozarion, kaj la mastro laŭte antaŭpreĝas. Poste sekvas la vespermanĝo. La ĉefaj manĝoj estas fiŝa supo, fiŝoj (ĉe ni plej ofte karpoj, ezokoj aŭ perkoj) kuiritaj kaj rostitaj, diversaj kaĉoj (ofte miksitaj kun sekaj fungoj); ĉe multaj familioj ankaŭ pizoj, diversaj kuiritaj kaj nekuiritaj fruktoj, farunaj manĝaĵoj k. t. p. laŭ la riĉeco de l' gepatroj. Post vespermanĝo ricevas ĉiu ankaŭ la kukojn, pomojn kaj juglandojn. La mastrino aŭ mastro kolektas atente ĉiujn fiŝajn ostetojn, aldonas al ili nukson aŭ juglandon, pecon da kuko kaj jetas ĉion en puton kaj ankaŭ sub arbojn, por ke ili havu multe da fruktoj. Poste li iras en stalon kaj metas en la buŝon de ĉiu besto pecon da kuko, pano kaj juglando; ankaŭ la hundo kaj kato ricevas tiun ĉi manĝaĵon, ĉar « ĉiu kreaĵo devas hodiaŭ ĝoji pro la naskiĝo de Kristo ».

Apud la pordo de l' stalo oni metas nun balailon aŭ faskon de pajlo, por ke la sorĉistino ne povu domaĝi al bruto. Vespere kaj ankaŭ nokte pafas junaj fraŭloj, ĉar ili tiamaniere forpelas la sorĉistinojn.

Ĉe multaj familioj — eĉ ne riĉaj — brilas post la vespermanĝo la Kristnaska arbo (= vánoční stromek) kun koloraj kandletoj. Ĝi estas ornamita per diversaj sukeraĵoj, juglandoj, nuksoj, pomoj, sekaj prunoj, piroj orumitaj k. t. p.; sub la arbo kuŝas diversaj ludiloj, libroj por infanoj kaj donacoj por la grandaj. Kiam la donacoj estas disdonitaj, ko-

mencas la amuzado precipe de fraŭloj kaj fraŭlinoj diversmaniere. (La infanoj estas okupataj per siaj ludiloj kaj ceteraj).

La persono ĵetas nerimarkite ringon sub poteton, sub alian li metas unu moneron, sub alian paŭnon. Poste venas aliaj personoj, kiuj levas la potetojn. La persono, kiu eliras la ringon, baldaŭ edziĝos, — kiu eliros la moneron, estos riĉa, — kiu eliros la paŭnon, havos da ĝi ĉiam multe.

Sub juglandajn ŝelojn oni dismetas ankaŭ iom da salo. Kies salo estos morgaŭ matene fluidiĝinta, tiu estos baldaŭ mortinta.

Kiu senŝeligos *malplenan* juglandon, tiu mortos dum la jaro. La knabinoj eliras pecojn da ligno el lignaro por sciigi, ĉu ilia fianĉo estos bela aŭ malbela. Se ili eliros rektan pecon, la fianĉo estos bela, en kontraŭa okazo — malbela.

Ili ankaŭ fandadas plumbon kaj verŝas ĝin en sanktigitan akvon. Laŭ la plumba formo ili ekscios, kiu estos ilia fianĉo. Se la plumbo havas la formon de plumo, li estos soldato, se ĝi similas al plugilo, li estos kamparisto k. t. p.

Ankaŭ, la knabinoj ĵetas malautauĝen super sia kapo la ŝuon; se la ŝuo per sia pinto montras la pordon, la knabino baldaŭ edziĝos.

La fraŭlinoj prenas pecojn da ligno el lignaro kaj portas ilin en ĉambiron. Tie ĉi oni ilin kalkulas: se la fraŭlino portis la pecojn *pare* (2, 4, 6, 8 k. t. p.), ŝi certe edziĝos.

En multaj domoj ĉiu fraŭlino metas pecon de sia kuko sur benketon apud la pordo. Poste vokas la hundon. Kies pecon la hundo plej frue manĝos, tiu plej frue edziniĝos.

Tiu, kiu havas, ombre, la plej grandan kapon dum la verpermanĝo, baldaŭ mortos k. t. p.

Ekzistas en Bohemujo ankoraŭ multaj aliaj kristnaskaj kutimoj laŭ la diversaj regionoj, sed mi pensas, ke tiuj ĉi estas jam sufiĉaj por montri, kiamaniere oni festas la kristnaskan antaŭtagon.

Mi aldonas nur, ke dum la 12^a horo nokte estas, en bohemiaj preĝejoj, festa sankta meso kun belaj kantoj, kaj per tio finiĝas la sankta kristnaska antaŭvespero. Ĉi tiuj kantoj havas nacian karakteron kaj estas propraj al la bohema popolo. Post la meso la junuloj pafadas « por forpeli la sorĉistinojn ».

FRANTISEK SVACINA,
faka instruisto en C. Budejovice,
(Bohemujo).



KELKAJ PERSONAĴOJ EL LA « BETLEMO » DE MIK ALÈS.

Franc-Brita Kristnaska Legendo.

Oni rakontas dum la vintraj vesperkunvenoj, ke la Morto promenas sur la vojojn, dum la Kristnaska nokto.

Iam, farmomastrino, kiu aliris la meznoktan meson, renkontis ĉevalon, sur kiu rajdas virino, kies kapon en kapuĉo oni ne vidas.

Ŝi alproksimiĝis ekĝemante kvazaŭ ŝi estus senfortigita pro laceco, kaj plendante ke ŝi ne povas plu marŝi. La rajdantino faris signon al ŝi por rajdi sur la postaĵon; sed kiam ŝi estis ektuŝinta la serveman vojaĝantinton: « Eh, kio! — ŝi ekkriis, — Vi estas malvarma kiel la *Morto*. »

« Tio ne estas miriga, mia bona virino, ĝi estas mi kiu estas la *Morto*. »

Granda estis la timo de la farma maestrino, kiel oni povas kredi. Kiam ŝi estis repreninta iom da kuraĝo, ŝi demandis al sia funebra kunrajdantino, kien ŝi aliras.

« Ĉe la meson », respondis la Morto, — rigardu min kiam mi estos en la preĝejo, vi sola vidas min; ĉiuj tiuj, kiuj mi tuŝos per tiu ĉi vergeto, mortos dum la venonta jaro.

Alveninte la preĝejon, la du virinoj malspuriris, kaj la farmomastrino estis la sola kiu vidas la *Morton*. Ŝi vidas ŝin promenantan inter la fideluloj ĝenufleksitaj, ektuŝetantan per sia vergeto jen unun, jen alian, ekzamenante nek la sekson nek la aĝon. Subite, ekvidante ke ŝia propra patro estas difinita de la funebra vergeto, ŝi ne povis deteni ekkrion; sed jam la morto estis malaperinta.

Dum la jaro, la vilaĝanoj kondukis al la tombejo ĉiujn tiujn, kiujn la funebra rajdantino estis markinta dum la kristnaska nokto.

Trad. D^o GAMBIER.



VILAĜANA MOVADO EN GURUJO.

Elstariginte postulojn, oni ĉesis prilaboradi bienulojn terajn, ĉesis kun ili ĉiajn komunikojn; estis deprenita de ili servistularo, k. estis decidite allasadi bienhavantojn en neniam populajn kunvenojn. Tiamaniere la milito estis anoncita kontraŭ du plej fortaj malamikoj de vilaĝanaro: kontraŭ nobelaro k. pastraro, sur kies flanko staris regnestro k. pastraro. Kreiĝis vilaĝanaj organizacioj, aperis proklamacio de Rusuja komitato de ruslanda social-demokratia laborista partio. Aperis sekretaj k. malsekretaj spionoj, aperis kozakoj k. guberniestro. Longaj amasoj da vilaĝanoj — junaj k. maljunaj — sub plifortigita akompano de kozakoj direktiĝis kutaŝan mallibercejon. Estis arestitaj ĉiuj iom sindonaj al popolo vilaĝaj instruistoj; komencis persista persekuto de inteligentularo. Aroganto de aŭtokratiaj satrapoj superis ĉiujn limojn. Sed popolo eĉ ne pensis cedi. Kontraŭe, movado iom post iom disvastiĝadis k. profundiĝadis: vilaĝanaro elmovigadis seninterrompe novajn revoluciajn rezervejojn.

De komenco mem de movado, tuta Gurujo akre dividigis en du malamikajn poziciojn — vilaĝanaj procentegistoj aliĝis al bienhavantoj. Batalado alprenis pure klasan karakteron, elĵetante sur arenon de batalado ĉiujn siajn fortojn k. kapablojn. Antisociale prediko de « spiritaj patroj », spionado k. denuncio de nobelaro, perforto k. arbitro, skurĝo, kaj vipo, — ĉio ĉi kuniĝis en unu armeon. Arestitoj estis administre, sen juĝista decido, ekzilitaj Orientan Siberion k. Arhangelskan gubernion. Vilaĝaj societoj estis submetitaj al virgado, sed popolo provis pasivan politikon de kontraŭstaro, ne donante al regnestro kaŭzon al konflikto.

Aŭtune 1903 dank'al agado de anoj de ruslanda social-demokratia laborista partio, estis farita unua kontraŭregnestra demonstracio de rekrutoj kunvenintaj en urbeto Ĉohataŭri. Ruĝa standardo levita de rekrutoj mem estis venke elportata el batalo.

1^{an} de Majo 1904 estis aranĝita festo. Kelkaj miloj de vilaĝanoj el urbeto Ĥidistavi sin direktis alian urbeton je interspaco de 7 verstoj (rusa mezuro de

longeco) por kuniĝi kun kolegoj de alia regiono. Proceso estis paca, sen iuj ajn armiloj; tion ĉi la polico utiligis k. renkontinte ilin en vojo, malfermis kontraŭ ili pafadon: du demonstraciintoj estis mortigataj. Rusujo, dum tiu ĉi tago perdis unu plej bonan gvidiston vilaĝanan. Tiamaniere, en procedo de bata'lo mem, movado pure ekonomika, dank'al despota regnestro aliĝis en politikan fundamenton k. direktiĝis kontraŭ arbitrema polico. En politika rilato la popolo maturiĝis k. sur ruĝa standardo, je unua vico, elstarigis minimam programon de ruslanda social-demokratia laborista partio. Ju pli la movado profundiĝadis, ju pli ĝi fariĝadis pli organizita, k. konscia, des pli la popolo fariĝadis kuraĝa k. aktiva. Tio ne okazis, kompreneble, sen pafoj. Ekster organizacio de R. S. - D. L. P., popolo mem komencis juĝon pri spionoj. Konataj spionoj estis mortigataj. Oni mortigis ankaŭ unu tre fervoregan polican suproficiston. Spionoj kapitulacis, ili konfesis en ĉio k. petis pardonon. Striko kontraŭ bienhavantoj daŭris du jarojn. Bienhavantoj restis sen peco da pano, ili estis devigataj kapitulaci. Postuloj de vilaĝanoj estis plene kontentigitaj. Pastraro ankaŭ kapitulacis: ĝi rifuzis preni monon de vilaĝanoj. Spiritaj patroj virtuoziĝintaj en spionado estis devigataj, anstataŭ malbeni, beni la movadon. Malamikoj estis venkitaj en ĉiuj punktoj. Regnestro estis surprizigita, kaj jam ne plu havis fortojn por batali kontraŭ la popolo. Tiu ĉi agadis tro taktike por ke oni povis ĝin frakasi. Regnestro perdis la kapon. La popolo do revenis al si. Venko iris post venkoj. Samtempe aperis flama proklamo de rusuja komitato de R. S. - D. L. P., alvokanta la popolon bojkoti ĉiujn regnestrarajn instituciojn. Ĉesis funkciadi juĝejoj: neniu sin turnadis al policofojejo. Naskiĝis provizora revolucia memregado k. ĝi postulis, ke ĉiuj obeu la popolan volon. Neniu havas rajton nescii tiun ĉi juĝon. Ĉiuj aferoj estas ekzamenataj de l' popolo mem.

(Daŭronta)

DOKTORO M. K.

La Modo, de Roksano.

Karaj koketulinaj, ĉu vi senpacience atendis min? Ĉu vi, sciante la mirindan akuratecon de nia ŝategata «Tra la Mondo», pensis ĉe la vekigo: «Hodiaŭ mi ricevos mian Illustraton kaj havos la gojon legi modajn sciigojn?» kaj ĝin havante en viaj blankaj manoj ĉu vi serĉas tuj mian nomon kaj legas unue mian artikolon? Jes? Ne? Mi volonte kredas, ke vi ĉiuj respondas: «Jes, jes» kaj estas ja preferinde, ke mi tiel kredas, ĉar kontraŭsupoze — mi havas tiel malbonan karakteron — mi metus finan punkton doninte al vi nenian informon.

Ho! Kia babilemulino! Mia paĝo pleniĝas, kaj mi nenion diris pri la Modo. Pardonu, pro kompatu: mi tuj komencos. Alpendiĝu al miaj lipoj — kiel ni diras france. — Atentegite aŭskultu.

Mi komencas.

Fraŭlinoj kaj Sinjorinoj,

La Modo laŭ la «Imperio» daŭras regi. Preskaŭ nenion novan alportas al ni tiu ĉi sezono, kaj kelkaj mokemuloj pretendas, ke tio ĉi ĉagrenas la virinojn.... tiel ŝanĝemajn. Vi ribelas, ne vere? kaj ekcrias:

«Kiom malkonataj ni estas, ni, kiuj personigas la konstantecon!» Sed.... mi revenu al miaj tualetoj.

Novaj estas la ŝultroj plilarĝigantaj, ĉu per la korsaĵo mem, ĉu per epoletoj aŭ falbalotoj. Vere novaĵo estas ankaŭ la maniko egalampieksa, sen faldo ĉe la manikloko kaj pensiganta pri «tubo», pleje trikvarone longa, jes... malgraŭ la malvarma vetero. Bonkoraj samideanoj, kompatu nin! ĉar, kelkfoje — hm! hm! ĉu mi ne devas diri ĉiam — nur por plaĉi al vi, karaj tiranoj — aŭ tiranatoj se vi volas — ni obeas la legojn de la kruela Modo.

Ĉiam ŝatata la mallonga «palto-sako», kies dorsa parto konsistas el du pecoj; la malsupra estas aŭ falbalo faldita aŭ basko. Tio kaŭzas ke la talia linio plisupreniras al la dorso, kio estas la karakterizo de l' nuna silueto (1).

Tre, tre moda la manteleto-bolero, kies modelon elpensitan de l' famkonata Bachwitz mi montras al vi.

Vidiĝis ankaŭ la ĉarma jaketo laŭ la modo dum Ludoviko XIII^a; ĝi estas ornamita

de galonoj kaj pasamentoj. Ha! La pasamentistoj rajte ĝojegas: butonoj, glanoj, franĝoj, galonoj, fine la tuta pasamenta serio estas la favorata ornamajo de l' nuna sezono.

La modaj koloroj estas la tuta skalo de l' verda, violruĝa kaj kaŝtanaj. Nigra drapa kostumo estas ĉiam eleganta, kaj ĉe la

«Grands Prix d'Automne» (Grandaj Premioj de Aŭtuno) en Parizo, oni vidis baroninojn kaj grafinojn nigre vestitajn.

Trege moda la tutnova veluro-ĉifono nomata ankaŭ veluro-tremeto larĝa je 110 cm., kaj la veluroj skota, punktita, strekita, kiujn oni uzas por tutaj kostumoj, kaj kombinas kun unukolora drapo. Ekz., tre eleganta estas jupo el malpala kaj blanka veluro kun jaketo el malpala drapo ornamita de l' sama veluro, aŭ kontraŭe jupo el tabakkolora drapo ornamita de veluro kun kvadratoj aŭ strekoj el kiu estas la bolero aŭ la palto.

Tia uzado de l' veluro ebligos fari moda nefreŝan tualeton.

Manikoj, supra parto de l' korsaĵo, zonuĉo, kaj, laŭguste, ornamoj de la jupo estos veluraj, kaj oni havos ĉarman robon.

Bedaŭre mi ne parolas pri la ĉapeloj; pro manko de loko mi devas prokrasti tiun temon ĝis mia venonta artikolo en kiu la feloj ne estos forgesataj. Tamen mi diras, ke la privilegiata ĉapelo estas la ĉapo aŭ rondigita, aŭ pleje longigita, kiel la modelo montrata.

Ĉi supre estas belega korsaĵo teatra el rozkolora ĥina krepo kun dika kaj maldika punto el Irlando, tafto brodita kaj plastrono el tula punto. Rimarku ĉe tiu modelo kiom plilarĝigitaj estas la ŝultroj kaj sekve kiom maldika ŝajnas la tafto.

ROKSANO.

(1) France kaj angle: silhouette. Hispanie: silueta.

Mallonga korespondado.

Kelkaj el miaj afablaj legantinoj petis de mi sciigojn pri tualetiloj, hejmaj komercaĵoj, k. c. Mi respondos per la revuo je la petoj akompanataj de 25 cent., kaj private al tiuj akompanataj de 50 cent. (Skribi al «Roksano» 1, rue Andoque, Béziers, France).

Tre koketa. — Jes, certe, kun granda plezuro mi respondos ĉiujn demandojn viajn. Pri viaj aĉetotaj feloj, turnu vin al la famkonata firmo Camille, 21, passage des panoramas, Paris, kiu estas la liveranto de niaj elegantulinaj.

Ĉagrenata. — Rekuragiĝu. La pasto de l' firmo Dusser, 1, rue J.-J. Rousseau, Paris, malaperigos sen doloro tiujn malŝatindajn haretojn.

Fino R. Paris. — Petu l' albumon kolorigitan de «Le Grand Dépôt» E. Bourgeois, 21-23, rue Drouot, Paris, en kiu vi senpene elektos admirindajn porcelanaĵojn, ceramikaĵojn, k. c.

R.



MODELO DE BACHWITZ.

El «La Mode Parisienne»



El «La Mode Parisienne»

37, Avenue de l'Opera, Paris.



Ni komencos en nia venonta numero serion de kuriozaj priskriboj pri la knabina vivado en Japanujo, kun tute interesaj fotografajoj speciale faritaj por «Tra la Mondo» de tre klera JAPANA inspektoro de supera knabin-lernejo, S^{ro} Kawaji.

Baldaŭ komenciĝos ankaŭ enpresado de ĥinaj fotografajoj pri kiuj tri fratoj fervore laboris por partopreni en la ĉiama pligrandiĝo de l' intereso de «Tra la Mondo»: Edgard W. Buchanan, ŝipoficiro, kiu faris la kliŝaĵojn kaj ilin sendis al nia amiko G. Douglas Buchanan. Tiu ĉi priskribis Esperante la vidaĵojn, post kiam alia frato aŭfable faris la fotografajojn. Al ĉiuj koran dankon.

A. M.

La Cedrarbaro de Teniet-el-Hâd.

Originalo de M. MENDE, (Algerio).

Tiel grupiĝas ĉirkaŭ patriarkaj cedroj la multego da cedridoj, kies formoj neniel estas similaj al tiuj de la naskinto. La maljuna cedro estas simila al prapatroj kiuj etendas siajn brakojn protektemajn por ŝirmi sian posteularon, dum la junaj cedroj plialtigas fiere siajn rektajn kaj maldikajn trunkojn kiel la abioj sur la krutaj flankoj de Alpoj.

Dum eble kvindek aŭ cent jaroj la kapo de juna cedro, kiel piramida cipreso, starigas rekten sian trunkon. Poste, la pinto kurbiĝas, kliniĝas; la altaj branĉoj tordiĝas kaj interkruciĝas; la arbo, se oni vidas ĝin de malproksime, fine similas al vasta fungo. Ĝi estis cipreso, ĝi nun estas ombrelpino: « pin parasol » (pino sunombrelo).

La poezio de l' arbaro aperas pli bone, pli plene, se oni forlasas la larĝan vojon vetureblan kaj se oni trairas sub arboj la ombraĵetojn serpentirantajn inter herbaraj kaj ŝtonegaj deklivoj.

Se tiam estas la printempo, en tiu soleco kantas la fringoj, fajfas la merloj, blekas la akridoj. Kelkfoje oni aŭdas kriadojn similajn al interinsultoj devenantaj de la plej densaj partoj de la arbaroj. Oni kredus aŭdi lavistinojn kiuj, tordante la tolaĵojn, okupas siajn langojn interŝanĝante malĝentilajn vortojn. Sed se oni proksimiĝas oni ekvidas forflugantan rapidege, grupon da garoloj, kiuj interdisputiĝis en siaj rifuĝejoj de la arbaro.

Floroj diversaj estas dissemataj kiel steloj sur la verdaĵo kovranta la teron.

Belaj ranunkoloj brile flavaj, lekantoj kun blankaj florfolietoj radiantaj, tulipoj fajrokoloraj kaj multe aliaj, ornamas la verdan tapiŝon. Oni admiras precipe belegajn orkideojn kun strangaj kaj ĉarmaj abelformoj je dek specoj malsimilaj. La plej rimarkindaj formoj, la plej brilaj koloroj altiras rigardon de la pasanto sur la florfolietarojn de tiu ĉi orkideoj. Oni dirus ke tiu insektofloro, kiu estas tiel brila kiel abelo kun flugiloj senmovaj, ŝajnas atendi aliajn abelojn flirtantajn, kiuj venos interŝanĝi la florsemojn kun ĝi.

Ĉio vivas en la arbaro malgraŭ la ŝajna soleco, kvankam la homo estas forestanta. Birdo, papilio, skarabo, akrido, dissemas la vivon per la movado. La vento tra la folietaro, la kanto de la birdoj, la brueto de la akridoj, la zumado de la muŝoj, la kanto de la perdrikoj surprizitaj kaj ekflugantaj, eĉ la kriadoj de la garoloj, ĉiu bruo kiu aŭdata sola, ofte malplaĉas, aperas tie dronita en harmonia koncerto.

Ne estas nur la vidado kaj la aŭdado, kiuj kontentiĝas; la flarado ĝuas la plej dolĉajn sentaĵojn, kiujn naskas la balzama blovo pasinta sur la burĝonojn de rezinarboj, ankaŭ la mielodoro de la floroj, la montaromo de la timiano, absinto kaj mento, eĉ l' aromo apetitdona de la fungo.

Fine, en arbaro ĉio donas la impreson de la vivo la plej densa. Oni sentas sin mem

pli bona, pli sana, pli vigla, pli ĝoja. La vivo sentiĝas sin interne kaj ekstere de nia estaĵo.

Tamen oni pripensas, ke la estado de la arbaro en tiu ĉi printempo ne estis tiel dum la pasinta sezono, kaj ne estos tiel ankoraŭ dum la sezono proksimiĝanta.

La kreskaĵo naskiĝis, vivas kaj mortos, sed la naturo neniam mortas.

Se dum la vintro, ĝi ŝajnas dormi, en la printempo ĝi vekigis pli fortika kaj ĉiam pli bela. Ĉiuj kreskaĵoj renaskiĝos per siaj semoj, la insektoj per siaj pupoj: La jaroj estas, unu post alia, eterna rekomenco.

La homa vivo aperas kiel peceto de la tuta universa vivo; niaj prapatroj havis certe tiun senton, kiam ili loĝigis la arbaron, la teron, la akvon kaj la ĉielon je multaj dioj kaj diinoj. La kreskaĵoj, la ŝtonoj, la fontoj, ĉiu estaĵo posedis animon, kaj kun ĝi la vivon, la pensadon, la volon kaj la agon.

M. MENDE.



FELIETONO

Poŝta Amo.

Hispana, de JOHANO MUNOZ KAJ PABO'N, Noveleto.
Tradukita de JOHANO GARCIA MARTIN, el Ubeda (Hispanujo). (*)

Al F^{ino} Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Ne ekzistas oferado, Marinjo de mia animo, eĉ tre granda kaj peniga, kiun mi ne estos preta oferi kaj meti sur ciajn altarojn. Oni ne disputas nek diskutas kun la dioj kaj ĉi estas mia diino. Ordonu kaj mi respektos kaj plenumos cian ĉiujn ordonojn. Kion do ĉi volas ke mi faru? Parolu, Mastrino, ĉi servulo aŭskultas. Ĉi *ekstaza* adoranto, volanta neniam forlasi sian ekstaton.

15, VIII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Jen estas, sinjoro, mia programo: I^e Pasigu unu semajnon ne skribante al mi. II^e Ellernu parkere la katehismon de pastro Ripalda kaj diru sincere, ĉu ĉi trovas ĝin prudenta kaj saĝeĉplena. III^e Tuj post kiam ĉi estos lerninta la katehismon kaj ni estos diskutintaj du el ĝiaj vundeblaj kaj kritikeblaj punktoj, ĉi filigos kaj eĉ defendos ĉiujn ajn opiniojn. Ĉu mi povas esti malpli *diktatorino*? Ĉi monstra idolo,

17, VIII, 1905.

MARINJO.

Al F^{ino} Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

De mia naskiĝo mi neniam pasigis semajnon plej malĝojan. Unu semajnon ne havinte sciigojn pri ĉi!... jen estas septaga infero. Mi, *kiel viro*, tralegis la katehismon kaj, kredu al mi, belulino mia, ĝi ĉarmas, mirigas, ensorĉas min... Ne estas kredeble ke oni tiom nesciu libreton tiel belan. Mi trovis ĝin neplibonigebla. Malgraŭ tio, tamen, al mi konfeso ŝajnas malfacilajeto... Mi konfesos, se ĉi volas: mi ne diskutas kun ĉi. Adiaŭ, vivo mia.

24, VIII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

For de mi, Karolo mia, la altrudado de io ajn, kio kontraŭstaras al ĉi prudento aŭ konscienco. Mi volas ĉin kristana: sed konvinkita. Penadu do konvinkiĝi pri la jeno: I^e Dio havas la rajton pardonon al ĉiuj. II^e Li devas esti, kaj ne alia, kiu altruda aŭ difinu kondiĉojn por donaci la pardonon. — III^e Tiaj kondiĉoj devas esti dolorigaj por l' homoj. Konsentu tion aŭ ĝin neadu laŭ inspiro de ĉi prudento. Ĉi *konkurantino*,

26, VIII, 1905.

MARINJO.

Al F^{ino} Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mi neadas, Donja (1) Teologistino, nenian temon, sur kiu apogiĝas ĉi nerifutebla logiko. Sed... se ĉi vidus, ĉarmulino mia, kiom da peno kostas al mi genufleksiĝi antaŭ viro kaj sciigi al li miajn personajn farojn! Sen kontraŭdiro, estas necese ke ĉi ĝin

ordonu por ke mi kuraĝu submeti al tiu... arbitraĵo; almenaŭ ŝajnas al mi. Ĉi *Fra Diavolo*,
28, VIII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mi celas ĉin konvinki kaj ne submeti. Konfesu nur kiam ĉi estos konvinkita. Sed diru al mi, sinjoro advokato, ĉu la juĝisto, kiu senkulpigas aŭ kondamnas iun tiamaniere agas, tial ke li estas privata pers-*no* aŭ, kontraŭe, tial ke li senpersonigas por fariĝi la korpigo de la leĝoj? Kial do insisti vidi en konfesprenanto viron kaj nur viron? Konfesprenanto ne estas viro; li estas la leĝo, la leĝo dia, Dio mem. Ĉi *Fra Anĝelika*.

30, VIII, 1905.

MARINJO.

Al F^{ino} Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Tre lerta kaj delikata doktorino. Dio estas do... Pli bone estas ĉin kredi ol tion elserĉi. Tio estas facile direbla, sed ĝia elpruvado ne estas eble tiel facila. Elmontru do pruvon, ĉar ĉi ne pretendas submeti min kaj mi tuj eldiros la « konfiteor ». Sed kiaj diabloj min enkondukis en tiajn disputojn? Tiom plaĉis al mi nia antaŭa pafadeto!... Dio min antaŭgardu de la doktorinoj... en Teologio!

2, IX, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Sinjoro artileriano. Ĉi postulas elpruvon, kaj mi estas devigata plaĉi al ĉi. Jen mi tion faros. Se la konfesprenanto estas nur *viro*, li *nur* povas pardonon ofendojn al li faritajn. Nu do, li aŭ pardonas ofendojn al Dio faritajn aŭ nenion li pardonas: li do estas Dio aŭ nenio li estas. Se tio ne konvinkas ĉin, daŭrigu la diskutadon. Tio al mi plaĉas pli ol l' amindumado. Ĉi instruistino.

4, IX, 1905.

MARINJO.

Al F^{ino} Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Magister dixit kaj estas bone dirite: aŭ neniu li estas aŭ li estas Dio. Oni do devas bruligi la konfesejojn kiel senutilaĵon, aŭ oni estas devigata alkuri sub ĝian standardon kiel diajon. Kredu al mi: pli bone mi efektivigos la unuan ol la duan. Ĉe tiu sola pensado miaj haroj starigas sur mia kapo!... Ĉi metis ĉin fingron en la vundon, enkondukante min en tiajn labirintojn. Ĉi volas devigi min kanti la palinodion (2). Tamen mi estas ĉi *tenoro*, kapabla, pro amo al ĉi, eĉ doni la *C* sopranan.

6, IX, 1905.

KAROLO.

(Daŭranta).

JOHANO GARCIA MARTIN,
(Hispanujo).

(*) Sekvo. (Vidu *Nejn 2an*, *ĉan kaj ĉan*). (1) Honora hispana titolo. (2) Tio signifas ke oni malkonfesas sian unuan opinionon.

MIKSALJOJ.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzaĵoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « Miksaĵoj » La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2^e Krom esceptoj speciale direktaj la solvoj devas esti sendataj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^e Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4^e Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

NOMARO de la gajnintoj kaj divenintoj.

Divenis : (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj)

Warden	36	37	38	39	40
Bacquet	36	37	38	39	40
Rigoir	36	37	38		40
Bastoul	36		38	39	40
F ^{no} Dumezil	36	37	38		40
Devoucoux	36	37	38		40
F ^{no} Allin	36	37	38		40
Sinjinoro BR.	36	37	38		40
Letenneur	38	37			40
Malfeliĉulo	36		38	39	
F. Soler	36			39	
Geyer	36				

Ankaŭ divenis la 36^{an} problemon : Steir — Searle — Levitskij — Göttl — Brossard — Revard'ano — Blagoveščenskij.

Klasigo por la tria kvaronjaro kaj premioj

Warden	5 frankojn mone
Bacquet	Albumon por poŝtkartoj
Rigoir	2 dekduojn da belaj poŝtkartoj

La gajnintoj estas petataj diri al mi, kion mi devas fari per aŭ pri la gajnaĵoj.

Mi lotemontris Warden antaŭ Bacquet ĉar ĉiuj du divenis 5 problemojn. Ankaŭ mi lotmontris Rigoir inter la divenintoj de 4 problemoj.

Atentigu !

En septembra numero oni montris la klišaĵon respondan de la II^a problemo, do ĝi estas nuligita, sekve la 1^a kvaronjaro estos nur du problema. Malgraŭ la granda facileco por la divenintoj, estos donata 3 premioj por tiu kvaronjaro.

Problemo IV^a (de CH. BRUNET).

- • • • Birdo
- • • • el rubando
- • • • duoningeniero
- • • • ebena landparto.

Oni legas horizontale kaj vertikale la vortojn.

Kelkaj praktikaj aferoj.

Kiel ni jam diris, Esperanto estas nun enirinta en la fruktonan periodon de aplikado kaj utiligo.

Tio necesigas novajn radarojn: apud la propagandaj organoj — grupoj kaj Societoj, kies celo estas konigi ĉiun maniere kaj en ĉiuj mezoj Esperanton — devos funkciadi organoj celantaj, ĉu utili al la esperantistoj, ĉu utili al la neesperantistoj (kio estas pera — sed bonega — propaganda rimedo).

La unua ideo (utilo por esperantistoj) ne estas nova: la unuaj numeroj de « Lingvo Internacia », de l' jaro 1897, enhavas nomaron de bonvolaj « agentoj de Esperanto » kiuj akceptis la taskon respondi al ĉiaj petoj pri seriozaj sciigoj faritaj de esperantistoj; sed tiam ĝi estis antaŭtempa kaj malprosperis.

En 1905, S^{ro} A. Carles, el Béziers (Francujo), prezentis ree tiun ideon dum la Boulogna kongreso, sed ne donante

Problemo V^a (de X....)

Mi estas io ree dirita

Intermiksi miajn literojn vi ricevos frukton ne ankoraŭ grandigitan.

Problemo VI^a (de X....)

Mi estas interspaco, antaŭmetu prepozicion kaj vi vidos beston.

Problemo VII^a (de NAZUMULO).

Prenu kartponton kaj ujon, miksu ilin, vi havos ĥemiaĵon uzatan de gladistinoj. Nun tranĉu min duone. Per mia unua duono miksa vi povos vin vesti kaj la dua miksa montrus al vi ujon. La vosto del' dua kaj kapo de l'unua montras parton de l' korpo; vosto de unua kaj ventro de l' dua, beston.

Problemo VIII^a (de LA SAMA).

Kial manĝegemulo similas al diablo ?

Problemo IX^a (de Ŝiŝinet).

Kun p mi ŝatas, kun r oni min manĝas, kun p kaj r mi estas spico

Problemo X^a (de LA SAMA).

Mia kapo similas mian voston, prenu do min per kapo aŭ per vosto mi estas ĉiam sama, tamen mia kapo brulas, mia vosto malsekigas.

Problemo XI^a (de K. K. RI. K.)

Mi estas videbla sed ne prenebla, iafoje blanka iafoje nigra, oni min vidas preskaŭ ĉie kie estas homo, returnite mi estas el haŭto.

Problemo XI^a (de LA SAMA).

Mi estas longa, maldika, rompebla, ŝanĝu unu el miaj eroj kaj mi estas mallonga, fortika, eltranĉu mian novan kapon kaj mi estas manĝaĵo gushava.

Rimarko. La solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj ĝis la 30^a de Januaro 1907^a

Knabeto ploregas sur la strato. Sinjoro kompatas lian ploron kaj diras :

— Kio okazis al vi.

— Mi perdis kvin centimojn.

— Bone, prenu ilin kaj silentu.

La knabo prenas la kvin centimojn kaj daŭrigas la ploregon.

— Kial vi ploras nun ?

— Ĉar se mi ne estus perdinta la unuajn 5 centimojn, nun mi havus dek.

Esp. 10072.

— Infano, ne petolu, ĉesu plori kaj lasu pace la sinjoron !

— Ĝi ne ĝenas min. Plaĉegas al mi la infanoj, kaj precipe kiam ili ploras.

— Kia strangaĵo. Kiam ili ploras ?

— Jes, ĉar tiam oni forsendas ilin al la lito.

Esp. 10072.

rimedojn por ĝin efektiviĝi. Fine, en 1906, la organiza komitato akceptigis de la kongresanoj la principon pri kreo de « konsulejoj », lasante la plej grandan liberecon al la esperantistoj por apliki, laŭ la lokaj eboj, la ideon reprenitan de S^{ro} Carles.

La dua celo (utilo por la neesperantistoj) estas persekutata — kaj jam sufiĉe ofte trafita — de unu jaro, de S^{ro} Th. Rousseau, kiu jam organizis Esperanto-oficojn en kelkaj urboj.

En la sekvanta artikolo, S^{ro} Th. Rousseau klarigas kiel, laŭ li, devas funkciadi la novaj organoj.

Komprenoble, kaj laŭ la cirkonstancoj, grupo, konsulo aŭ konsularo, Esperanto-ofico, povos esti kunigitaj aŭ funkciados tute sendepende. Sed, laŭ ni, en la dua okazo estos necese ke ĉiam ili interkonsentu kaj interkonsiliĝu periode.

A. MONTROSIER.

Esperanto internacia praktikilo.

Kelkaj praktikaj aferoj.

Certe, la konsuloj kreitaj aŭ kreotaj en ĉiu urbo, laŭ la projekto de S^{ro} Carles, kaj post aprobo de la II^a Kongreso de Esperanto, multe pli faciligos la uzadon de Esperanto kaj pligrandigos ĝian utilon por la esperantistoj, kiuj vojaĝadas en fremdlando aŭ eĉ en sia lando.

Ekzemple supozu ke vi estas germano, kaj ke vi alvenas Lyon'on, en Francujo, ne konante aŭ malbone konante la francan lingvon, sed povante sufiĉe bone paroli Esperanton. Elvagoniĝinte, vi iras rekte ĉe unu el la Lyon'aj konsuloj kaj vi demandas lin pri bona hotelo, pri restoracioj, esperantistaj se eble. Se vi estas komercisto vi demandas lin pri la komerca movado de via fako en lia urbo. Li donas al vi la nomaron de la firmoj, kiuj uzas Esperanton kaj por kiuj via esperantisteco estos rekomenda titolo. Se vi estas studento, kaj deziras precipe lerni la lingvon francan kaj studi la kutimojn kaj enlandajn morojn, li rekomendos vin al kelkaj samideanoj, kun kiuj vi povos paroli, komence en Esperanto, poste en franca lingvo, kaj kutimiĝi je la franca vivado. — Se vi estas turisto, li diros al vi, kiuj estas la vidindaĵoj de la urbo k. t. p.

La konsulo devos ankaŭ klopodi, konsente kun la grupo, por trovi *Esperantistan Salonon*, en kiun ĉiu esperantisto trapasanta povos veni por legi la revuojn esperantajn, kaj por babiladi kum samideanoj; speciala tago en la semajno estus difinita por regula kunveno. En tiu salono oni devos trovi la jarlibron kun aldonaĵo preciza pri la esperantismo en la urbo, adresoj de la konsuloj, esperantistaj komercistoj k. t. p.

Estus treege utila ankaŭ havi en ĉiu urbo *Publikan Esperanto-oficon*, kiu celus precipe esti utila al la *neesperantistoj*. Ĝi helpus ilin por la traduko el Esperanto aŭ en Esperanton de ĉiuspecaj dokumentoj (leteroj, komercaj prospektoj k. t. p.). Ĝia sekretario komunikus kaj disdonus al la publiko, esperantista aŭ ne, la komercajn cirkulerojn, Esperante redaktitajn, kiujn li ricevas. Por tio, li komunikus ilin al la esperantistoj de sia urbo en ĉiu kunveno; li presigus anoneojn en la lokajn ĵurnalojn, se la sendintoj tion petis; se li ricevis prezarojn, prospektojn disdonotajn, li petus la vendistinojn de la Esperantista vendejo tion fari.

La Publika Esperanto-oficejo, la konsulo, kaj la grupo tre bone farus, elektante en sia urbo *Esperantistan vendejon*, ĉe kiu oni povus aĉeti ŝlosilojn de Ĉefeĉ, esperantajn poŝtkartojn, stelojn kaj pinglojn esperantistajn, lernolibrojn esperantajn, revuojn, gvidlibrojn pri la urbo kaj la ĉirkaŭaĵo k. t. p.

Afiŝejo, t. e. eĵeto — ekzemple en la fenestrego de l' Esperantista vendejo — en kiu oni afiŝus la sciigojn al la publiko esperantista aŭ ne, (kursoj, kunvenoj, ekskursoj, adresoj de la konsuloj, Publika Esperanto-oficejo, esperantista salono, Esperantista vendejo k. t. p.) estus ankaŭ tre utila.

Fine, en multaj urboj oni alprenis la *adreson Esperanto-ofico en...* (nomo de la urbo) por leteroj, kiuj ne koncernas la propagandon sed kiuj koncernas nur la uzadon kaj utiligon de Esperanto. Do, la poŝtendoj, ĉu al la konsulo, ĉu al la Publika Esperanto-ofico de tiuj urboj povas esti direktataj laŭ tiu adreso.

Jen estas nomaro de la urboj en kiuj, laŭ mia kono, estas konsulo, Publika Esperanto-ofico, Esperantista salono, Esperantista vendejo, afiŝejo. Ni varme konsilas niajn legantojn, ke ili uzu ilin kiel eble plej ofte, kaj diskonigu iliajn utilojn por Esperantistoj kaj neesperantistoj.

Alĝerio. — *Constantine*. Konsulejo kaj Publika Esperanto-Ofico: ĉe S-ro A. Baissac, 1, rue d'Aumale.

Aŭstrolando. — *Vieno*. — Pub. Esp. Of. S-ro Hans Romanowicz, 1, Zentagasse.

Reichenberg (Bohemlando). — Konsuloj kaj Pub. Esp. Of.: S-ro R. Richter.

Leitmeritz (Bohemlando). — Pub. Esp. Of.: S-ro Wilhelm Heller E. S. R.

Praha (Bohemlando). — Pub. Esp. Of.: ĉe Esperantista Klubo II, 1322.

Belglando. — *Huy*. — Pub. Esp. Ofico: Adreso: Esperanto-Ofico en Huy.

Bulgarlando. — *Sitistra*. — Pub. Esp. Of.: S-ro Jonko Davidof.

Franclando. — *Béziers*. — Centra Konsulejo por Franclando: S-ro A. Carles, rue des Balances.

Aix-les-Bains. — Konsulo kaj Publika Esp. Of.: D-ro Coze, 6, rue du Temple.

Amiens. — Pub. Esp. Of.: S-ro Queste, rue G. de Rumilly, 74.

Angers. — Pub. Esp. Of.: S-ro Galard, rue de Brissac, 24.

Beaune. — Pub. Esp. Of.: ĉe l' Grupo Esperantista, 20, boul.

Bretoumière. — Esperantista vendejo kaj afiŝejo: ĉe la tabakvendejo, rue de Lorraine.

Boulogne-sur-Mer. — Pub. Esp. Of.: ĉe l' grupo Esperantista.

Bourg. — Konsulo kaj Publika Esp. Of.: S-ro Rousseau, 6, place Carriat. — Esperantista Salono: Hotelo de la Paix et Terminus apud la stacidomo (regula kunveno: ĉiun lundon 8 h. 1/2 vespere). — Esperantista vendejo kaj afiŝejo: ĉe S-ro Jobelin, tabakvendistino, avenue d'Alsace-Lorraine. Adreso: Esperanto Ofico.

Brest. — Pub. Esp. Of.: ĉe la grupo Esperantista.

Charenton. — Pub. Esp. Ofico: S-ro Rigoir. Adreso: Grupo Esperantista en Charenton.

Charlres. Pub. Esp. Of.: 7, rue des Côtes. Adreso: Esp. Ofico.

Le Creusot. — Konsulejo kaj Pub. Esp. Of.: ĉe F-ino Langeron place Schneider.

Lyon. — Pub. Esp. Of.: ĉe la Grupo Esperantista; sek. S-ro Prof. Offret, chemin des Pins.

Konsulo: S-ro F. Servet, rue Garibaldi, 47;
S-ro F. Drudin, rue Tronchet, 107;
S-ro E. Vincent, rue Paul Bert, 3;
S-ro G. Pouchot, rue de la Martinière.

Nantes. — Pub. Esp. Of. Afiŝejo: D-ro Sacquet. Adreso: Esperanto, Nantes.

Parizo. — Pub. Esp. Of.: ĉe la Esperantista Grupo.

Reims. — Konsulejo kaj Pub. Esp. Of.: ĉe S-ro Chauvillon, librovendisto, 4, place Royale.

Romorantin. — Konsulejo kaj Pub. Esp. Of.: ĉe S-ro E. Bollé, 54, rue Nationale.

Rueil. — Pub. Esp. Of.: S-ro Ch. Hiélard, Boulev. des Tillouls. Adreso: Esperanto-Ofico.

St. Etienne. — Pub. Esp. Of. Adreso: Esp. Of.

Tours. — Pub. Esp. Of.: ĉe S-ro Maurice Patin, 5, rue Michelet. — Esperantista vendejo kaj afiŝejo: S-ro Duguay, librovendisto. Adreso: Esp. Ofico.

Germanlando. — *Frankfurt*. — Pub. Esp. Of.: S-ro C. Barthel 14, Wöhlerstrasse.

Stuttgart. — Pub. Esp. Of.: ĉe Prof. Christaller, 1, Neue Weinsteige. Adreso: Esperanto-Ofico.

Granda Britlando. — *Keighley*. — Pub. Esp. Of.: S-ro Alfred d'Eduarte Smith, 27, Park Grove.

Hispanlando. — *Valencia*. — Pub. Esp. Of.: ĉe la Grupo Esperantista.

Italando. — *Palermo*. — Kontoro Komerca Esperantista, Via Calderai, 18.

Ruslando. — *Peterburg*. — Pub. Esp. Of.: D-ro Asnes, 24, Bol. Podjaĉeskaja log. 12.

Svedlando. — *Stockholm*. — Pub. Esp. Of.: S-ro Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan.

Svislando. — *Laufon*. — Centra konsulejo por Svislando ĉe S-ro Pastro Schneeberger.

Adelboden. — (Berna Oberlando.) — Konsulejo kaj Pub. Esp. Oficejo: ĉe S-ro Th. Hopf, apotekisto.

Hegi. — Pub. Esp. Ofico: S-ro Gustavo Schwengeler. Adreso: Esp. Of. en Hegi Winterthur (Kantono de Zurich); aŭ: Esp. Of. Winterthur Postfach (poŝtkesteto) 13252.

Lausanne. — Konsulo, Pub. Esp. Of., Esperantista vendejo kaj afiŝejo: ĉe S-ro Thonney 10, rue du Tunnel. Adreso: Esp. Of.

Usono. — (Unuigitaj Ŝtatoj). — *Philadelphia*. — Pub. Esp. Of.: ĉe Fino Neuhaus 519 N. 11 Str. Adreso: Esperanto-Oficejo.

TH. ROUSSEAU.

Bonvolu sendi ĉiun novan sciigon al S-ro Th. Rousseau, 6, place Carriat, Bourg (Ain), Franclando.

Ni tre atentigas niajn legantojn pri la ideoj, tre meditindaj, enskribitaj en tiun ĉi artikolon.

Prave, la Ĝenèva Kongreso decidis lasi al la libera iniciato la zorgon plenumi la ideon, pri kiu ĉiuj konsentis.

La raportanto ne volis proponi regulojn pri la makleraj pagoj, kiujn aludis S-ro Carles en sia projekto (1) dirante: multaj servoj, sendube, estos farataj senpage.

Ŝajnas al ni, ke tie staras unu el la kaŭzoj de la malprospero de l'unua provo (1897). Oni tro kutimas pensi ke, ĉar oni estas esperantistoj, oni devas ĉion havi nenion pagante. Laŭ ni, la principo de maklera pago devas esti nepre respektata de l' konsulejoj; alie — kaj devige — ili vivos nur « tiom, kiom vivas la rozoj, la daŭron de mateno! »

A. M.

(1) Rue des Balances, Béziers (France).

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

ESPERANTAJ ORGANOI.

Eŝo Esperantista — Praktika kaj komerca. Ĉe S^o H. Brühl, Unter den Linden 47 III, Berlin, Deutschland.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S^o Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Ĉiunonata resume de Photo-Revue. Jara abono, 5 fr. 1 Numero aparte, 50 cent. Ĉe la « Librairie photographique » Charles Mendel, 118 Rue d'Assas, Paris.

Juna Esperantisto. — Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain, Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

Lingvo Internacia. — Duonmonata Esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komenciĝo de ĉiu monato.

Unua Paŝo. — Monata bulgara gazeto en Esperanto. Pritraktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^o S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgarie.

PROPAGANDAJ ORGANOI.

Amerika Esperantisto. — Angle kaj Esperante. 1 Dolaro — 5 Fr. Oklahoma City, U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras ĉiunonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

The British Esperantist. — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Centrameriko Esperantista. — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abril, 8^a Avenida Sur 11, Canton Libertad, Guatemala, Ameriko.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

Esperanto. — Hungare kaj Esperante, Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^o Marich Agoston, Pappnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

Esperanto-Journal. — France kaj Esperante, 24 numeroj. Francujo kaj Svisujo: 3 fr.; aliaj landoj: 3 fr. 75. Pago per poŝtmarkoj je 10 % de kalkulo. Adm.: P. R. Central Genève (Suisse).

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunonate). Redaktata germane kaj Esperante. JARABONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, — kun ilustraĵoj. Jarabono 60 senoj — N^o 1^a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 25, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiunonata organo de la S-to « Espero »; Esperante kaj ruse — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de la lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; novaj famaj beletristikaĵoj, versaĵoj kaj mult. al — Detalaj prospektoj riceveblaj, senpage. — Jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to « Espero ») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOI.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

La Gazette de Lausanne. — Journal politique et littéraire. Organe de 1^{er} ordre. Grand format. Fondée en 1798. Paraissant six fois par semaine. — *La Gazette de Lausanne* est un des journaux les plus appréciés et les plus répandus de la Suisse et de l'étranger. Elle offre à ses lecteurs un ensemble de renseignements complets, soit sur les affaires du pays, soit sur la politique étrangère. Elle a des correspondants dans les principales villes de la Suisse. De même à Paris, Bruxelles, Rome, Berlin, etc., d'où elle reçoit des lettres périodiques. — *La Gazette de Lausanne* a pour collaborateurs les meilleurs écrivains de la Suisse romande. Elle publie des chroniques artistiques, musicales, scientifiques et militaires. Feuilletons choisis. Service télégraphique étendu.

De Luthof. — Ĉiunonata multilustrata revuo. — Ĝiekzistas de 5 jaro kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj.
Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belgando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

Nekomercaj anoncetoj.

23. Manuel Zabala, Banko de Vizcaya, Bilbao (*Hispanujo*) interŝanĝos uzitajn poŝtmarkojn, esceptante francajn kaj anglajn, centope, aŭ kvincentope maksimume.

24. Paŭlo Keilich, Cöln-Lindenthal, Gleuelerstrasse 135 (*Germanujo*) deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. Ĉiam tuj respondos.

La Astmo Venkita !!

La letero jena, de nia lerta kunlaboranto, D^o Busuttill el Misida, Malto, ŝajnas montri ke, per uzado de « Vixol », rapide suferanto iĝas suferinto.

« Plezure mi sciigas vin, ke de la unua momento de la almetado de via ilaro, la malsanulo ekspiradis pli facile kaj nun, post kuracado de apenaŭ du semajnoj, li spiras tute libere kaj saltas kiel vera kaprido pro la ĝojo de malĝenata spirado. Kaj pensu, ke mi jam estis forlasinta lin kiel nekuracebla ! »

Tiu fakto povas esti utile konigata al astmuloj.

The Vixol Syndicate
304, BRIXTON HILL, LONDON, S. W.

Ilustritaj poŝtkartoj propagandaj.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO »

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monpapere.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Algerio!
1 fr. afrankite, ĉiu dekduo.
Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo »
Fr. 1,50 ĉiu centoj.
Ĉe « TRA LA MONDO »